der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

10. Jahrgang Nr. 61/62 (5/6) Dezember 1973 60 Pf

**La vero pri la puĉo en Ĉilio:**

# Sanga komploto de la monopoloj

**Heredo: Dependa ekonomio, mizero**

Jen la heredaĵo de la kristan-demokratia registaro sub prezedinto Frei al Unidad Popular (Unuiĝo Popola).

*Stagnado kaj krizo*

- Dum alta plukresko de la nombro de la enloĝantoj inter 1964 kaj 1970 pojare altiĝis
  - — la kuntara naciprodukto per nur 2,5 procentoj,
  - — la industria produktaro per 3,8 procentoj.
- La agrikulturo stagnas, vivnecesas importoj de nutraĵoj.
- Ĉirkaŭ 4000 milionoj da dolaroj kiel ŝuldoj al eksterlandoj. La inflacia kreskonombro estas 35 %

*Profitegoj de la konzernoj*

- La plej ĉefaj industrioj estas en la mano de la eksterlanda kapitalo (Usono, FRG k. a.)
- Profitegoj estas akiritaj: la usona kuprokonzerno Kennecott akiris dum 1955 — 1970 pojaran kapitalrenditon [1]) de 52,87 procentoj.

*Socia mizero*

- 300 000 da senlaboruloj (8,3 procentoj)
- 500 000 senloĝejaj familioj
- ekstreme alta infanmortado

**Estonteco: Sukcesoj de la UP-programo**

La ĉilia popolo estis sufiĉe fitedita de ĉi „benoj“ de siaj en kaj eksterlandaj regantoj. La 4an de septembro 1970 ĝi voĉdonis por la kandidato de Unidad Popular, d-ro Salvador Allende, por la 40-punkta programo de la Unidad Popular, por:

- la senpotencigo de la eksterlandaj konzernoj
- la naciigo de la ĉiliaj tertrezoroj

1) rendito = profito el akcio

- la ŝtatigo de la bankoj kaj bazaj industrioj
- la konsekvenca agrara reformo
- la disponigo de novaj laborlokoj
- la konstruado de novaj loĝejoj por la laboruloj

Lakto, pli altaj salajroj, pano

La UP-kabineto sin montris inda je la konfido de siaj balotintoj.

*Al la unuaj faroj de UP apartenis:*

- ĉiutage duona litro da lakto senpage por ĉiuj infanoj sub 15 jaroj
- 35procenta plialtigo de ĉiuj salajroj kaj dungopagoj, la minimumaj salajroj plialtiĝas per 66 procentoj, porfamiliaj pluspagoj duobliĝas
- firmigo de luprezoj kaj prezoj de bazaj nutraĵoj
- novaj ŝuoj por duona miliono da infanoj
- la bakistoj devas baki bonan, malmultekostan, unuecan panon. La infanmortado malkreskas per 20,1 procentoj ĝis la fino de aŭgusto 1971.
- 260 000 da homoj denove havas laboron.

Rompita potenco de la konzernoj

*La bazo por tio:* naciigo de kupra minado kaj fandado, ŝtatigo de 23 privataj bankoj, teksaj konzernoj, cementfabrikoj, ferercaj kaj karbaj minejoj.

**La sukceso:** La industria produktado en 1971 kreskas per 12 procentoj, la kuntara socia produkto per 8,5 procentoj. La inflacia kreskonombro malkreskas ĝis 22 procentoj. La senlaboreco atingas staton ĝis nun plej malaltan (3,7 procentoj). Loĝejoj kaj lernejoj.

*En 1972a oni sukcese daŭrigas la batalon kontraŭ mizero:*

- Estiĝas 140 000 da novaj loĝejoj
- Novaj lernejoj por 800 000 infanoj
- Terposedaĵo trans 80 hektaroj estas dividata inter la kamparanoj

**Kontraŭrevolucio: Krei kaoson**

Anaconda (Anakonda) kaj Hertie (Herti), eksterlandaj monopoloj kaj enlanda oligarĥio vidas siajn profitojn nuliĝi. Ilia ĉefa celo: Neniigo de Allende, de la UP-registaro. Ilia metodo: Krei kaoson kiel pretekston por ŝtatrenverso.

ITT, CIA kaj Blanka Domo

- La estroj de la ITT-konzerno (kapitala investaĵo en Ĉilio: 200 milionoj da dolaroj) proponas en 1970 al la usona registaro unu milionon da dolaroj por komploto celanta malebligi la oficiĝon de Allende. Oni aktivigas CIA-n, konsultas la Blankan Domon.
- En 1971a la kupromonopoloj per helpo de Vaŝingtono sabotas la pagbilancon de Ĉilio.
  - La mondmerkata prezo por kupro estas manipulata. Ĝi malkreskas de 750 da sterlingaj pundoj (marto 1970) al 394 st. p. (novembro 1971), sed kreskas post la puĉo ĝis 850 st. p. (14a de septembro 1973)
  - Ŝipoj kun naciigita kupro estas konfiskataj de tribunaloj de Usono kaj okcidenteŭropaj ŝtatoj kun aprobo de la registaroj.
  - Ĉiuj kreditoj por Ĉilio estas blokataj.
  - La kontoj de Ĉilio en Usono estas blokataj.

La sekvo: La valutoj de Ĉilio por importoj de nutraĵoj malabundiĝas. Oni volas krei malsaton.

*FRG-ambasadoro ĝis „FAZ“*

- FRG-ambasadoro Osterheld kaj „Konrad-Adenauer-donacaĵo“ en 1970 prosperigas la ĉilian reakcion per plena (ankaŭ financa) subteno.
- En 1971 la „Frankfurter Allgemeine“ (Frankfurta Ĝenerala [gazeto]) FAZ — postulas: „La komerçado, antaŭ ĉio la importo de kupro, estu plej rapide novdirektata.“ Tuj la FRG-importoj malkreskas per 20 procentoj.
- La FRG-registaro samjare stagnigas la „evoluigan helpon“ por Ĉilio kun jeso de la ministroj Scheel (Ŝel) (FDP, liberal-demokratia) kaj Franke (SPD, social-demokratia)
- FRG-entreprenoj rompas la kontraktojn kun Ĉilio por damaĝi ĝian ekonomion.

Strikoj, murdoj, atencoj

*Man-enmane kun la deeksteraj atakoj la interna reakcio ekmarŝas:*

- Almenaŭ 630 milionoj da dolaroj eksterlandiĝas per organizita kapitalfuĝigado.
- „Nigraj Merkatoj“ (= kontraŭleĝaj) por valutoj kaj retenitaj nutraĵoj estiĝas.
- Strikoj de transportistoj, privatkomercistoj, teknikistoj, aviadistoj kaj partoj de la kuprolaboristaro organiziĝas.
- La produktado de la privata industrio malpliiĝas, investaĵoj haltas, kamparoj senplantiĝas.

La perdojn de la burĝaro bankoj en Usono kaj okcidenta Eŭropo rekompencas pli ol malavare. Ili pagas ĝis duoblo de la normala salajro.
*Politika teroro aliĝas al la ekonomia kaoso:*

— murdatencoj al UP-politikistoj
— eksplodaĵ-atencoj kontraŭ elektrostacioj kaj partikonstruaĵoj
— provokitaj stratotumultoj

*La 22an de aŭgusto sekvaŝ la antaŭlasta frapo:* La dekstra plimulto en la kongreso riproĉas al la UP-registaro senpruvaĵe „rompon de la konstitucio“. Pri tio komento de la 2a televido de FGR: „Tio signifis instigon de puĉo“.

Se devas morti 20 000 ...

La faŝisma organizaĵo „Patria y Libertad“ (demagogie: „Patrio kaj libero“) minacas: „Se devas bruli ĉi tiu lando dum la saviĝo kaj se tial 20 000 ĉilianoj devas morti — ni faros“.

Unue kaoso en la ekonomio, nun amasmurdo — por savi potencon kaj profiton!

*Je la 11a de septembro ĉi tiu minaco realiĝas:*

- Prezidanto Allende murdiĝas, oni akcelas ĉason al UP-ministroj, komunistoj, socialistoj, miloj da patriotoj. Al ĉiu, kiu staras fidele al la laŭkonstitucia registaro, minacas „tuja ekzekuto“.
- Brutece murdiĝas per bomboj, tankoj kaj raketoj centope la laboristoj, kiuj sin defendas en siaj fabrikoj kontraŭ la puĉuloj.
- Multaj miloj estas arestitaj kaj forrabitaj, egalmultaj ankoraŭ persekutitaj. La reakcio volas pereigi per brutala perforto ĉion, kio rememorigas pri la trijara regado de Unidad Popular, pri la granda espero de jarcente torturita kaj subpremita popolo.

# Vielfältige Verbindungen zu Bruderländern

Die Entwicklung der sozialistischen Integration, wie sie seit dem XXIV. Parteitag der KPdSU in eine neue und in die bisher bedeutungsvollste Phase getreten ist, bringt auch für den Kulturbund eine Reihe von Verpflichtungen, die auf dem VIII. Bundeskongreß große Beachtung fanden und in der Entschließung des Kongresses fixiert wurden.

So geht es u. a. darum, mit den spezifischen Mitteln der vielen im Kulturbund vereinten Fachbereiche einen wesentlichen Beitrag zur weiteren Vertiefung der Freundschaft zwischen unseren befreundeten sozialistischen Staaten zu leisten, mehr Wissen über die Entwicklung von Ökonomie, Kultur, Wissenschaft sowie über die Sehenswürdigkeiten unserer Verbündeten zu vermitteln und vor allem das Gefühl und die Haltung des proletarischen Internationalismus weiter auszuprägen. Zwar sind die Freunde der internationalen Sprache nur ein sehr kleiner und bescheidener Teil des Kulturbundes, doch leisten sie einen beachtlichen Beitrag bei der Realisierung der oben erwähnten Ziele. Sie verfügen über die Möglichkeiten reibungsloser internationaler Kommunikation, was bei der praktischen Entwicklung freundschaftlicher Kontakte durchaus von Bedeutung ist.

Sie nutzen ihre vielseitige individuelle und Kollektivkorrespondenz, die vielen persönlichen Verbindungen, Besuche bei oft langjährigen Freunden, Aktivitäten auf internationalen Treffen und die sich daraus ergebenden vielen Gespräche zur Entwicklung und Vertiefung einer Freundschaft mit Bürgern aus der Sowjetunion, Polen, der CSSR und den anderen mit der DDR freundschaftlich verbundenen sozialistischen Staaten, die sich konkret, praktisch und selbstverständlich aus eben diesen zahllosen Kontakten ergibt.

Unter den Esperantisten finden sich viele Arbeiter, Hausfrauen, Angehörige der verschiedensten Schichten und Berufe, für die ein langwieriges Fremdsprachenstudium oft zu aufwendig gewesen wäre. Sie haben aber durch die im Kulturbund bestehenden Gruppen die Möglichkeit, sich ebenfalls praktische Fremdsprachenkenntnisse mit beträchtlichem Wirkungsradius anzueignen und praktisch teilzunehmen an der Entwicklung dauerhafter internationalistischer Bindungen und Verbindungen.

Besonders vielfältig sind die Verbindungen zur Sowjetunion. Und diese haben gute Traditionen seit den 20er Jahren, als es sehr zahlreiche und wirksame Beziehungen zwischen deutschen und sowjetischen Arbeiteresperantisten gab. Viele Briefe sowjetischer Esperantisten an deutsche

---

(resto de pĝ. 3)

**Ekonomia blokado, organizita malsato, stabe planita amasmurdo — jen la respondo de la imperiismo pri batalo de popolo por pli bona, homeca vivo. La ĉilia popolo suferas nedireble sub la teroro de la puĉuloj. Gi suferas repuŝon en sia batalo sed tiu ne estas daŭra. La liberiga movado de la popoloj estas nehaltigebla!**

**Liberecon por Luis Corvalàn kaj ĉiuj enkarcerigitoj!**

(Trad. laŭ div. dokumentoj de Michael Lennartz)

Arbeiter gerichtet und häufig auch veröffentlicht, z. B. in der „Sächsischen Arbeiter-Zeitung“ in Leipzig, in der „Volkswacht“ in Rostock, wirkten aufklärend über die Entwicklung im ersten sozialistischen Staat der Welt und zerrissen das Lügengewebe bürgerlicher deutscher Propaganda. Aber auch sowjetische Zeitschriften und Zeitungen wie „Prawda“, „Iswestija“, „Proletari“ (Charkow), „Nash Putj“ (Krementschug) veröffentlichten Fragen und Stellungnahmen deutscher Arbeiter-Esperantisten zum Aufbau des jungen Sowjetstaates.

Es ist klar, daß diese Traditionen heute wieder lebendig sind, unter völlig veränderten historischen Bedingungen. Die meisten Korrespondenzwünsche, die in „der esperantist“ oder der DDR-Ausgabe des „Paco“ erscheinen, kommen aus der Sowjetunion. Kollektivkorrespondenz und freundschaftliche Beziehungen gibt es zwischen vielen sowjetischen und DDR-Gruppen, z. B. zwischen Dresden und Leningrad, Rostock und Klaipeda, Potsdam und Minsk, Magdeburg und Donezk, um nur einige zu nennen. Ein Höhepunkt in der Entwicklung der Beziehungen war die Freundschaftsfahrt von 150 DDR-Esperantisten im Juni 1972 nach Leningrad. (vgl. „der esperantist“ Nr. 54, 55/56).

Aber auch zu unseren Nachbarstaaten, der Volksrepublik Polen und der ČSSR, gibt es zahlreiche freundschaftliche Kontakte, und die gemeinsamen Veranstaltungen werden immer häufiger. Seit einigen Jahren unterhält der Bezirksarbeitskreis Esperanto in Neubrandenburg Freundschaftsbeziehungen zur Wojewodschaft Koszalin und ordnet sich in die bestehenden kommunalen Verbindungen ein.

Die Rostocker Esperantisten waren 1972 und 1973 mehrere Male zu Gast bei Szczciner Esperantisten, die ihrerseits auch Mitte Mai 1973 mit über 30 Freunden der DDR-Hafenstadt einen Besuch abstatteten. In den anderen Grenzbezirken Frankfurt/Oder, Cottbus, Dresden und Karl-Marx-Stadt beginnen sich ebenfalls stabile Beziehungen zu polnischen und tschechischen Esperantisten herauszubilden.

Das erfolgreiche Dreiländertreffen in Seifhennersdorf im November 1972 war für 120 Esperantisten aus 3 Ländern (darunter allein 80 aus Polen und der ČSSR) bei einem niveauvollen Kulturprogramm und reichem Erfahrungsaustausch ein praktischer und wirksamer Beitrag zur Vertiefung der Freundschaft und internationalistischen Denkens. (vgl. „der esperantist“ 57/58). Es folgten weitere Begegnungen, so u. a. im Juni dieses Jahres in Ostrov in der ČSSR, wo an einem DDR—ČSSR-Freundschaftstreffen allein 40 Esperantisten aus dem Bezirk Karl-Marx-Stadt teilnahmen.

Besondere Erwähnung verdient das im Juli 1972 mit sehr gutem Erfolg in Rabenstein bei Karl-Marx-Stadt durchgeführte internationale Zeltlager, an dem u. a. Esperantisten aus der SU, Polen, der ČSSR, Ungarn und Bulgarien teilnahmen. 80 Esperantisten diskutierten u. a. über Fragen der europäischen Sicherheit und die Entwicklung der sozialistischen Integration. Vertreter der Bezirksleitung des Kulturbundes, der Nationalen Front, der Bezirksleitung der FDJ und des Rates des Bezirkes stellten sich Fragen der ausländischen Gäste. Natürlich gab es auch viel Tanz, Folklore, Sport und gemütliche Stunden. (vgl. „der esperantist“ 55/56). Man sollte aus diesem Zeltlager lernen und ähnliche organisieren. Die persönlichen Kontakte und Freundschaften zwischen den Esperantisten

der DDR und den befreundeten Bruderländern werden immer zahlreicher und enger. Über 20 internationale Seminare, Sommerlager und andere Veranstaltungen in den sozialistischen Staaten bieten vielfältige Möglichkeiten dazu.

Die sich kontinuierlich entwickelnde Zusammenarbeit der Esperanto-Verbände der sozialistischen Staaten lassen die Esperanto-Bewegung aller sozialistischen Staaten immer mehr zu einer beachtlichen politischen Kraft werden, die ihren positiven Beitrag in der internationalen Klassenauseinandersetzung leistet, einen wesentlichen Anteil hat an der Ausbildung internationalistischen Denkens, Fühlens und Handelns und den Kulturaustausch der sozialistischen Länder unterstützt.

Für die weitere Arbeit der Esperantisten in der DDR gilt es u. a. zu beachten:

1. Die vielfältigen stabilen Verbindungen zur Sowietunion und zu den anderen sozialistischen Ländern müssen noch stärker und vor allem zielstrebiger ausgebaut und auf der Grundlage des Marxismus-Leninismus vertieft werden.
2. Es gilt auch, das Esperanto in weitaus stärkerem Maße als ein Mittel zum Zwecke des Kulturaustausches, der Information über die politische, ökonomische und kulturelle Entwicklung zu nutzen und dabei eine gewisse fachliche Enge zu überwinden. Wünschenswert wäre eine größtmögliche Einordnung in bereits bestehende kommunale Partnerschaftsbeziehungen zwischen Städten und Gemeinden der DDR und den sozialistischen Staaten.
3. Die Esperantofreunde müssen es also noch besser verstehen, ihre vielseitigen Möglichkeiten für die internationalistische Arbeit der **gesamten** Organisation zu erschließen und zu praktizieren.

*Detlev Blanke*

---

**Resumo:** En la artikolo „Multspecaj rilatoj al frataj landoj“ la aŭtoro, sekciestro por Esperanto en Kulturligo, akcentas la neceson, ke la tuta Kulturligo priprofundigu la reciprokan scion pri la ekonomia, kultura kaj historia evoluo en la socialisma ŝtataro, por ankaŭ tiel evoluigi la proletan internaciismon. Speciale bonajn eblecojn rilate ĉi-tio disponas la esperantistoj. Resumante la tradiciajn peresperantistajn germana–sovetajn rilatojn el la dudekaj jaroj la aŭtoro donas kelkajn ekzemplojn pri aktualaj intergrupaj kontaktoj. Bone ankaŭ evoluas la pli kaj pli stabiliĝantaj kontaktoj al grupoj el Pollando kaj Ĉeĥoslovakio, kaj ankaŭ al Hungario kaj Bulgario. Dum la lastaj du jaroj speciale elstaraj internaciaj aranĝoj en GDR estis i. a. trilanda renkontiĝo en Seifhennersdorf kaj junulara tendaro en Karl-Marx-Stadt. Konklude la aŭtoro postulas, ke la esperantistoj de GDR

1. pli forte ligu amikecajn rilatojn sur la fundamento de marksismo-leninismo al la esperantistoj de socialismaj landoj,
2. pli efike uzu Esperanton kiel ilon de kultura interŝanĝo, speciale enkadre de la ekzistantaj ĝemelourbaj rilatoj,
3. pli multflanke uzu la peresperantajn internaciismajn eblecojn en la servo de la *tuta* Kulturligo.

# *Kunsido de Centra Laborrondo en Magdeburg*

La tria kaj lasta ĉijara kunsido de Centra Laborrondo okazis la 27-an kaj 28-an de oktobro 1973 en Magdeburg, en la klubo „Otto von Guericke". Estis laborriĉa kaj streĉa kunsido por la 25 partoprenintoj. En sia ampleksa ĉefreferaĵo la prezidanto de CLR, Rudi Graetz, vaste pritraktis la staton de la esperantista agado en GDR por 1973 kaj la problemojn solvendajn por 1974. Li specialan atenton donis al la internacia laboro. La ĉefajn ideojn de la referaĵo oni povas eble resumi jene:

1. *La celkonscia laboro de la esperantistoj de GDR trovas kaj en GDR mem kaj eksterlande pli kaj pli da intereso kaj prestiĝo. Tiun faktc favoran situacion oni devas multe pli bone utiligi kaj por la socia kaj por la faka (Esperanton mem rilatanta) agadoj.*

2. *La pli kaj pli ĝeneraliĝanta politiko de paca kunekzistado speciale en Eŭropo kaj la proceso de la integrigo de la socialismaj ŝtatoj, ne nur ĝenerale kreas pli bonajn kondiĉojn por la laboro de la esperantistoj sed eĉ tion postulas en daŭre kreskanta grado. La signifo de Esperanto nacie kaj internacie pligrandiĝas, ĉar tiu lingvo devas servi en altiĝanta grado por solvi ĝeneralinteresajn por la socio problemojn. Necesas do ekkoni tiun novan situacion kaj laŭi al ĝi.*

3. *Necesas multe plivastigi kaj pliprofundigi la rilatojn al la socialismaj ŝtatoj. Tio kompreneble speciale validas por la rilatoj al la najbaraj ŝtatoj Pola Popola Respubliko kaj Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko.*

4. *Por adekvati al la kreskantaj bezonoj necesas realigi la „gvidprincipojn" (kp. „d. e." 57/58) je pli alta nivelo. Tio signifas i. a.*

   — *Plibonigo de la enhava laboro en la grupoj (komp. paĝojn 18—21)*

   — *Eduko de politike, lingve kaj fake ĉiuflanke kleraj kadruloj (funkciuloj) por la esperanto-movado.*

   — *Plistabiligo de la gvidantaroj sur ĉiuj ebenoj.*

   — *Pli da atento al la junulara laboro.*

   — *Pli bona uzo de la pli granda intereso por Esperanto, elvokita i. a. per la artikolegoj en grandaj revuoj, por la organizo de kursoj.*

   — *Multe pli efika uzo de Esperanto por la internaciaj rilatoj de la tuta Kulturligo.*

   — *La sciencaj aspektoj de Esperanto fariĝas pli kaj pli gravaj kaj estas pritraktendaj sur la bazo de marksismo-leninismo.*

Dum la kunsido estis montrita la dua en GDR sinkronigita filmo kolora „Hieraŭ ni ankoraŭ estis infanoj" (pri la junularo de GDR, 40 minutoj, lumsono, 16 mm).

La tre multflanka kaj altnivela entute 5-hora diskuto (se oni adicias la tempon de ambaŭ tagoj) ĝenerale tre optimismige skizis la staton de la laboro sur distrikta kaj subdistrikta ebenoj sed ankaŭ tuŝis multajn plibonigendajn aferojn korektendajn erarojn kaj venkendajn obstaklojn.

*A. Charkowski, Moskau*

# *Unser Freund Ludwig Schödl*

*Ludwig Schödl ankaŭ estas fervora instruisto, kiu skribis la unuan Esperanto-lernolibron en GDR.*

*(1972 in Leningrad)*

Im Sommer dieses Jahres trafen sich sowjetische Esperantisten mit ihren Freunden aus der DDR. Einer von ihnen war der alte Kommunist Ludwig Schödl, Schulleiter in dem kleinen Städtchen Neuruppin. Wir unterhielten uns mit ihm während des Ausfluges in Petrodworez. Es war ein klarer Tag. Die Gebäude Leningrads waren von der Anlegestelle aus gut zu sehen. Vor dreißig Jahren rechneten sich die Faschisten hier in Peterhof aus, wieviel Tage noch bis zum Fall der Stadt blieben. Da die heldenhaft widerstandleistende Stadt, hier Plünderung, Zerstörung, Frevel.

„Sie fragen, was ein Deutscher nach einem Besuch von Petrodworez fühlt? Bitternis bei dem Gedanken daran, daß sich jemandes Hand gegen solche Schönheit erheben konnte. Stolz auf Euch, die Ihr dies Meisterwerk zu neuem Leben erweckt habt, und auf die Deutschen, die in den schwersten Jahren mit Euch waren".

... Ludwig Schödl wartete hinter dem Bahndamm versteckt. Der Gefangene der vom französischen Vichy-Regime verratenen „freien Zone" erhielt den Befehl der Partei zu flüchten, sich nach Deutschland durchzuschlagen und dort illegale Arbeit zu leisten. Eines Tages meldete sich beim Morgenappell ein anderer an Schödls Stelle. Und so war Ludwig Schödl hierher hinter den Bahndamm gelangt.

Ein Sprung, und schon war er auf dem Trittbrett des Zuges. Im Zug spielte er den „Patrioten", der ins geliebte „Vaterland" eilt. Offiziere übergaben ihn der Gestapo. Man warf ihn ins Gefängnis. Abermals Fol-

---

(resto de pĝ. 7)

Dum la kunsido speciale estas pritraktitaj la rezultoj de la X-a Monda Festivalo, de la 58-a Universala Kongreso en Beogrado kaj la 29-a Internacia Junulara Kongreso en Sarajevo.

Al k-do Helmut Fuchs estis transdonita la honorinsigno de MEM, per kiu lin distingis la Internacia Komitato pro liaj meritoj en la MEM-agado.

Entute la kunsido estis tre fruktodona kaj, kiel jam videbliĝas, estas bone konkludata en distriktaj kunvenoj.

Specialan dankon meritas la amikoj el Magdeburg, kiuj estis bonaj kaj agrablaj gastigantoj, ankaŭ speciale vespere.

terungen und Verhöre. Er blieb standhaft. Er wurde zwar auf freien Fuß gesetzt, doch nicht an die Front geschickt. Man traute ihm offenbar nicht. Ludwig Schödl ging in ein Werk und wußte sich von der Gestapo bespitzelt.

Viele waren im letzten Kriegsjahr auf der Suche nach einem Ausweg aus der Tragödie, in die der Faschismus Deutschland gebracht hatte. Im Flüsterton verurteilte man Hitler. Doch zu kühneren Schritten konnten sich nur wenige entschließen. Die Kommunisten klärten die Massen über den wahren Stand der Dinge auf. Der halbillegale Zirkel, der von Ludwig Schödl geleitet wurde, befaßte sich mit der „deutschen Ideologie". Erst wenn die Arbeiter in den Zirkel kamen, erfuhren sie, daß es sich um das berühmte Werk von Marx und Engels handelt. Dann ging man zu den Arbeiten Lenins und zur politischen Gegenwart über.

Aufzeichnungen wurden nicht gemacht, man befürchtete Spitzel. Doch unter den Arbeitern gab es einen Schwätzer. Er erzählte alles seinem Vater, einem Ladenbesitzer. Der kam zornesrot zu Schödl:

„Sie lehren meinem Sohn den Bolschewismus. Ich werde das anzeigen. Hängen wird man Sie!"

„Nur keine Eile. Ich weiß, daß Sie einst den Kaiser vergöttert haben, für den der Führer keine Sympathie hegt. Das Bild des Kaisers tragen Sie auf der Brust eintätowiert. Dann werde ich eben auch zur Polizei gehen, und wir werden gemeinsam am Galgen baumeln."

... Ludwig Schödl atmete auf. Die Gefahr schien vorüber. Und dann kam der Sieg. Er befand sich in dem von den Alliierten besetzten Westberlin. Einen Monat lang arbeitete der Zirkel legal. Dann kam der Befehl, die Zusammenkünfte einzustellen.

Ludwig Schödl fuhr in seiner Erzählung fort: „Doch ich wußte, daß bereits ein neues, sozialistisches Deutschland entsteht. Um es aufzubauen, ging ich in den Osten. Das war in der schweren Nachkriegszeit, und so befragte mich ein sowjetischer Offizier, wer ich sei und woher ich komme. Ich sagte: Ich bin ein deutscher Kommunist. Darauf er: Womit können Sie das beweisen? Mein Parteibuch war im Konzentrationslager vergraben. Ich sagte also: Fragen Sie mich doch über die Werke von Marx und Lenin aus, dann werden Sie verstehen. Der Offizier unterzog mich einer regelrechten Prüfung. Ich habe sie offenbar bestanden. Der Offizier lächelte und sagte: Geben Sie Ihr Studienbuch her. Er war Dozent für Geschichte an der Moskauer Hochschule. Und bald darauf leistete ich Parteiarbeit schon völlig legal im freien, demokratischen Berlin."

Schödl schwieg. Unser Autobus war in Rasliw angekommen, wo sich Lenin vor seinen Feinden verborgen gehalten hatte. Ludwig Schödl besichtigte Iljitschs Hütte, doch am längsten verweilte er vor dem Stand mit den Büchern Lenins.

Woran dachte er zurück? Wie er sie unter Lebensgefahr in den strengsten Tagen des Faschismus gelesen hat? Wie er das wahre Wort Lenins unters Volk getragen hat? Er hat sein Leben mit dem Kommunismus und dem Kampf gegen den Faschismus verbunden. Und hier im heldenhaften

**Ludwig Schödl**

# Esperantomovado IFA - Kulturligo de GDR -

*Fritz Bischoff*

Post la unua mondmilito formiĝis proletaj kulturgrupoj, kiel ekkreskas fungoj post pluvo en la varma suno. Por ĉiuj ĝenroj troviĝis entuziasmaj junuloj: kantado, teatro, pentrado, skulptado, verkado, agitado-propagando, parolĥoroj, filatelo, fotoarto ... Same la proleta Esperanto-movado evoluis rapide, esperige. Ĉiu grupo, organizo, movado havis sian specialan intereson, sed tamen por ĉiuj ankaŭ estis komuna celo: anstataŭigi la putrantan kapitalisman sociordon per socialisma, sen senlaboreco, sen militarismo, kun floranta kulturo. Komence de la 30-aj jaroj konsciiĝis la unuopaj organizoj, ke ili povus agi multe pli efike, se ili kunigus siajn fortojn. En aŭtuno 1931 ili fondis por ĉiuj komunan tegmentorganizon IFA = *Interessengemeinschaft Für Arbeiterkultur* (interesunuiĝo por laborula kulturo). Nun estis pli facile organizi komunajn spektaklojn, trovi kontakton kun la loĝantaro, popularigi siajn celojn. *GLEA (Germana Laborista Esperanto Asocio)* apartenis al la fondintoj de IFA, kaj ĝis la faŝisma tempo, eĉ ankoraŭ en la nelaŭleĝa periodo, intime laboris en ĝia kadro. Tiel GLEA povis paŝi el sia izoleco. Ĉe ĉiuspecaj spektakloj ni povis ekspozicii, informi pri Esperanto. Aliaj organizoj invitis nin. Ni eĉ sukcesis aperigi ĉiusemajne Esperanto-tekstojn sub la bildoj de la lasta paĝo de la popularа ilustrita gazeto AIZ (*A*rbeiter-*I*llustrierte-Zeitung) sub la temo „el tuta mondo".

En la lastaj jaroj prezidanto de IFA estis *Fritz Bischoff*, saĝa kamarado, kiu ankaŭ en la tempo de floranta ŝovinismo de l'unua mondmilito kon-

---

(resto de pĝ. 9)

Leningrad konnte er deshalb seinen sowjetischen Freunden ehrlich in die Augen schauen.

*(Übers. aus: „Sowjetskaja Molodjosh", Vilnius, 3. 12. 1972)*

**Resumo:** Traduko el la rusa, publicita en Sovetskaja Molodjoŝ 3. 12. 1972 pri la meritplena laborista esperantisto kaj membro de CLR Ludwig Schödl. Schödl rakontas al ĵurnalisto pri sia politika laboro dum la faŝisma regado en Germanio.

servis sian homan dignon. Li estis unue membro de l'Spartakus-Ligo, poste de la germana kompartio. En la unuaj tagoj de l' faŝismo, kiam li eksciis, ke ni esperantistoj sekrete preparas nian unuan multobligitan bultenon germanlingvan, li tuj petis nin, fabriki kelkajn milojn pli da ili, kaj li ankaŭ aranĝis la transdonon de tiuj kajeroj al neesperantistaj grupoj, kiuj ankoraŭ ne kapablis mem eldoni ion. K-do Fritz Bischoff bone rekonis la valoron de nia por-kaj per-Esperanto-agado kaj esence helpis nin, liberiĝi el la izoleco. Kamarado Fritz Bischoff estis arestita en septembro 1934. En Kassel li estis kondamnita de faŝisma tribunalo pro ‚Perfido de l' Patrio' al 8-jara karcero. Poste li ne liberiĝis, sed laŭ faŝisma maniero ili retenis lin en koncentrejoj, unue en Sachsenhausen, poste en Neuengamme. Kelkajn tagojn antaŭ la liberigo; la internigitoj de Neuengamme kiel de kelkaj aliaj koncentrejoj devis marŝi en longegaj kolonoj al la maro. Tie ili devis enŝipiĝi, la kapitanoj ricevis ordonon, stiri al Anglio sed kiam la ŝipoj estis sur la maro, ili estis detruitaj per germana artilerio. Inter la 8000 tiel murditaj en aprilo 1945 troviĝis nia kamarado Fritz Bischoff.

La faŝistoj ne sukcesis, haltigi la historion. En tiu parto de Germanio, kiun okupis la Ruĝa Armeo, la militinstigantoj kaj militkrimuloj estis senigitaj de ilia ekonomia bazo. La vojo estis libera por nova, progresa evoluo. Certe, la komenco estis tre, tre malfacila. Ĉie nur ruinoj. Apenaŭ oni kuraĝis esperi, ke tie iam en nia erao estos normala vivo. Kiel sur la tero, tiel aspektis la cerboj. 12-jara kulto de faŝisma ŝovinismo postlasis profundajn radikojn en la kapoj. En tiu malesperiga tempo kolektiĝis manpleno da homoj, homoj en la plej bona senco de la vorto, ĉe la pinto kamarado *Heinz Willmann* (interparenteze: amiko de Esperanto), kiuj starigis al si la taskon, daŭrigi la tradiciojn de IFA. Ne sufiĉas la deziro. Por ekagi oni almenaŭ bezonis modestan oficejon, sed nur estis ruinoj kaj milionoj da senhejmaj homoj. La eta grupo intertraktis kun sovetiaj kompetentuloj kaj akiris la permeson, preni el la detruita fortikaĵo de Hitler, kion ili povus trovi uzeblan. De tie venis la traboj kaj plankobretoj, per kiuj ili konstruis sian oficejon, la oficejon de la „*Germana Kulturligo por la demokrata rekonstruo de Germanio*". Ĝia unua prezidanto fariĝis nia plej fama poeto kaj verkisto de tiu epoko, Johannes R. Becher. Ne estis facile, fariĝi amasmovado, necesis multe diskuti kaj konvinki niajn intelektulojn pri ilia misio por pli bona Germanio.

La Germana Kulturligo, nun „*Kulturligo de GDR*" ne plu estas ignorebla. Ĝi havas firman bazon en ĉiuj urboj de nia respubliko. Ĝi havas siajn deputitojn en la parlamentoj de la subdistriktoj, de la distriktoj kaj de la Volkskammer. (popola parlamento.)

Niaj plej aktivaj esperantistoj jam longe antaŭ la fondiĝo de la Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo klopodis pri formigo de sekcio Esperanto en la Kulturligo. Ne sukcesis la unua klopodo, sed veraj esperantistoj ja estas obstinaj. Nun nia sekcio ekzistas jam pli ol 8 jarojn. Ĉu plenumiĝis niaj esperoj? Jes kaj ne.

*Jes*, ĉar kiel sekcio de la Kulturligo ni subite trovis rekonon en la kultura kaj politika sferoj, krom bedaŭrindaj maloftaj esceptoj ĉesis la stultaj artikoloj kontraŭ Esperanto de ignorantoj kun akademiaj titoloj, kaj ekde nun dependis de la esperantistoj mem, aperigi pozitivajn artikolojn en la gazetoj kaj informojn per radio, kion ili uzas tre diference. La tuta potenca organizo kun vasta reto de dungitoj, la hejmoj, kon-

ferencejoj ktp. estas je nia dispono same kiel por la aliaj sekcioj. El la budĝeto de la Kulturligo ni ricevas multoble pli grandan sumon ol ni meritus laŭ nia membrostato aŭ membrokotizoj. Nia prestiĝo tiel grandiĝis (kaj ĉiam pli grandiĝas) ke ni povis instigi aliajn organizojn kaj instancojn, eldoni librojn kaj broŝurojn, por kies eldonoj al ni sole tute mankus la forto. Tre grava estas la influo de unuopaj komisionoj de la Centra Laborrondo al eksteresperantistaj medioj, kiel la komisiono pri esploro de la Laborista Esperanto-movado kaj la komisiono pri interlingvistiko, kies invitojn al kolokvoj volonte sekvas elstaraj sciencistoj de nia respubliko.

*... kaj ne plenumiĝis niaj esperoj ...*

Antaŭ la fondiĝo de la Centra Laborrondo ni ofte fanfaronis pri 3 — 5 mil da esperantistoj sur nia teritorio. Ni iom supraĵe taksis laŭ la iamaj membronombroj de la diversaj Esperanto-organizoj. Ni supozis, ke ĉiu esperantisto aspirus rekonon de Esperanto, ke ĉiu esperantisto suferus pro la pasiveco, kaj ke post la rekono, post la ebleco, libere povi disvolvi siajn kapablojn, kunlabori por interesaj klubkunvenoj — varbi kursanojn kaj gvidi kursojn — verki artikolojn pri Esperanto, fariĝi delegito por distriktaj aŭ centraj konferencoj ... senescepte ĉiu esperantisto ekkaptus tiun unikan ŝancon. Sed ho ve! Forrestis kaj ankoraŭ forrestas multaj el ili. Kial? La plej multaj el ili revis pri izolita sekto, en kiu ili povus flegi inter si kiel antaŭ kelkaj dekoj da jaroj lingvoludetojn, ĉiam denove persvadi sin mem pri la utileco de Esperanto por la homaro, k. s. Ĉefe temas pri „samideanoj", kiuj laŭdire malŝatas politikon, ĉar ili neniam klopodis, kompreni ĝin. Sed ĉu ili tion volas aŭ ne, ĉu ili tion ekkonas aŭ ne: ĉiu homo ludas *sian* rolon en la politiko. Inter la kapitalisma kaj socialisma mondoj staras barikado. Eblas nur troviĝi sur tiu aŭ sur la alia flanko. Fritz Bischoff, IFA, GLEA ... certe troviĝis ĉe la socialisma flanko. Kun ili ankaŭ malpli konsciaj, kiuj ne kuraĝis batali, kiuj plejofte flankenstaris, sed kiuj nun rekonis, ke ankaŭ ili apartenas al ni. Sur la alia flanko staras la faŝistoj kiel la ekstremaj reprezentantoj de la kapitalisma mondo, sed ankaŭ tiuj, kiuj senemocie eltenis regadon de la faŝistoj, kiuj provas meti sur saman ŝtupon la batalantojn por socialismo kaj la teroristojn faŝistajn. Ili kutime nomas sin senpolitikaj, sed ili, ĝuste pro sia sindeteno elbligis kaj ebligas fakte ĉiun fiagon de la faŝistoj. Al tiuj apartenas ankaŭ kelkfoje esperantistoj. Aŭ kion pensi pri esperantistoj, kiuj malebligis simpatiesprimojn de esperantistoj por la suferanta vjetnama popolo (UK en Tokio)? Kiuj nun restas ekster niaj vicoj pro malsimpatio al Kulturligo, do simple perfidas la progreseman, humanisman sintenon de niaj viktimoj kiel Fritz Bischoff, de niaj francaj fervoregaj esperantistoj *Marcel Boubou kaj Marcel Bourguignon*, de nia aŭstra kamarado, esperantisto *Franz Jaritsch* kaj tiom da aliaj, murditaj en germanaj koncentrejoj de faŝistoj. Ili do distancigas sin de niaj viktimoj, de la organizo de Johannes R. Becher kaj samtempe montras sian situon rilate al la barikado.

Mi aŭdis babiladojn pri ‚demokrateco', sen ke la babilantoj iam provis informiĝi pri la reguloj de la Kulturligo. La liganoj, membroj el ĉiuj niaj partioj aŭ senpartianoj, ateistoj, kristanoj aŭ judoj, partoprenas — tio almenaŭ estas devo kaj dezirata — la jarkunvenojn de la grupoj, kie la estraroj raportas pri siaj pasintaj aktivecoj. La raportoj post fundaj diskutoj aŭ estas akceptitaj aŭ kritikitaj. La novaj estraroj estas elektitaj laŭ sekreta voĉdono, kiel ankaŭ la delegitoj por la subdistriktaj ĝeneralaj

(resto de pĝ. 13)
kunvenoj, tie la delegitoj por la distriktaj ĝeneralaj kunvenoj kaj fine tie tiuj por la Ligokongreso. En ĉiuj ebenoj partoprenas ni esperantistoj, kaj esperantistoj apartenas al la estraroj de ĉiuj ebenoj. Komparu tion kun la ‚demokrateco' de certaj Esperanto-organizoj, kies kongresoj estas vizitataj de tiuj, kiuj povas mem pagi la vojaĝkostojn kaj la kongreskotizojn, kiuj nun kunsidas kaj decidas pri la agado de la organizo. Certe, mi scias, ke la malforta financa stato de tiuj Esperanto-organizoj ne permesas alian solvon, sed ĉe ni estas delegita tiu, kiu montriĝis plej aktiva, plej kapabla sen ia konsidero de financa situacio. Tiaj estis la 200 delegitoj en Karl-Marx-Stadt en oktobro 1970, kiuj aŭskultis kaj post vigla diskuto akceptis la raportojn de la Centra Laborrondo kaj decidis pri la plua laboro. Kaj tiel estis 1972 en Berlino ĉe nia II-a Centra Konferenco.

Nia agado estas tre multflanka. La diversaj agantoj preferas tiun aŭ alian flankon. Unu ĵuras pri la utileco de nia poezio, alia de la prozo, tiu por la originala, alia por la tradukita. Unu defendas la utilecon de Esperanto en sporto, alia en turismo, alia en sciencoj, aliaj opinias, ke ili ĉiuj estas senutilaj, ke nur valoras la ekonomia utileco ... senfina ĉeno. Mi opinias, ke ĉiu agado por kaj per Esperanto, escepte tiun kontraŭ la progreso, estas utila kaj necesa. Ju pli da homoj scias kaj aplikas Esperanton, des pli da sukcesoj. Jen, amasa Esperanto-movado fariĝus grava kultura faktoro. Per abstinado de organiziteco en Kulturligo tiuj esperantistoj fakte malutilas al la tuta Esperanto-movado.

---

Forta bato por MEM

kaj la tuta progresema esperantistaro

**TOMAŜ BALDA**

ĝenerala sekretario de Mondpaca Esperantista Movado, prezidanto de la ĉeĥoslovaka MEM-Sekcio kaj estrarano de ČEA, estrarano de Ĉeĥa Packonsilantaro, laŭreato de la Ĉeĥoslovaka Pacpremio, de la Honor-insigno „MEM 1953—1973" ktp., senlaca batalanto por monda paco kaj internacia amikeco, forpasis la 8-an 12. 1973.

Ni honorigos la noblan forpasinton, kiu senlace agadis por paco kaj la celoj de MEM, per eĉ pli energia daŭrigo de la komuna verko en lia spirito. Tomáŝ Balda restos neforgesita.

**Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR**

## Alta distingo por Walter Röhner

La prezidanto de Distrikta Laborrondo Esperanto Dresden kaj membro de Centra Laborrondo *Walter Röhner* estas nelacigebla esperantista aktivulo en Kulturligo de GDR kaj kiel tia multe meritas pri la bona evoluo de la esperanto-laboro en la distrikto. Por siaj meritoj kaj bona laboro nia amiko Walter Röhner la 28. 6. 1973 estis distingita per la Johannes R. Becher-medalo en arĝento.

Ni tutkore gratulas al la distingito kaj deziras al li multe da sano kaj ĝojo en la laboro por kaj per Esperanto. *CLR*

# Ĉilia HIMNO de Unidad Popular

# Venceremos – ni venkos

D A⁷ D A⁷ D D⁷

*Ven-ce—re—mos*, ja, ni ven—kos, ba-tu for ĉenojn por la po-

G Eᵐ A⁷ D E⁷

pol'! *Ven-ce—re—mos*, kaj ni ve—nos al li—ber' el mi-ze—ra i-

A⁷ D A⁷ D A⁷ D D⁷

zol'! *Ven-ce—re—mos*, ja ni ven—kos ba-tu for ĉenojn por la po-

G Eᵐ A⁷ D E⁷ A⁷ D A⁷

pol'! *Ven-ce—re—mos*, kaj ni ve—nos al li—ber' el mi-ze—ra i-

D *Fine* A⁷ D D⁷

zol'! Ek-de el fundo de l' pa-tro-lan-do ek-le—vi—ĝis la vok' de l' po-

Me-ti—is—toj, solda-toj, kampis-toj kaj vi—ri—noj el ni—a Ĉi-

G Eᵐ A⁷ D Hᵐ E⁷

pol', la Ĉi—li—o, la tu—ta, per kan—to jam kun-i—ĝas per ni—a pa-

li', o—fi—cis-toj, studen-toj, mi-nis—toj ple-nu-mi-gas la de-von de

A⁷ D A⁷ D D⁷

rol'. La ku—ra-ĝajn solda-tojn ni vi—das kaj ek—zemplon: a-gad' sen mo-

ni. Ni se—mi-gos la kampojn per glo-ro, so-cia—lis—ta la est' en Ĉi-

G Eᵐ A⁷ D G D A⁷ D *2×D.C. al Fine*

ral'. Ni ne-ni-am hejmanojn perfi—das, es-tu ni—a kompa-ra fa—nal'!

li, ni u—ni-ĝos en daŭ-ra ho-no—ro plenu-mi—gi la de—von de ni.

*Jürgen Hamann*

# *Traduku sen germanismoj!*

Antaŭ du aŭ tri jaroj amiko mistifikis min petante de mi la tradukon de jena frazo: *Fajro-kiu-viro multe de la gvidanto.* Nur relative malfrue mi sukcesis „deĉifri" la lingvaĉon: *Feuerwehrmann fiel von der Leiter.* Jam Zamenhof donas al ni similan ekzemplon (1) por sensence laŭvorta traduko: *Mi blanka ne, kie mi pensi etaĝo kvieta havo.* Germane: *Ich weiß nicht, wo ich meinen Stock gelassen habe.*

Eksterlanda amiko, al kiu mi regule sendas „der esperantist", atentigis min je „stranga vorto trovita en kelkaj numeroj" de tiu ĵurnaleto. Kontrolo pruvis al mi, ke mi (verŝajne ankaŭ aliaj esperantistoj) ne tro lingvokonscie legas la artikolojn, en ĝi aperantajn. Temas pri la nocio *„partitago"*.

Kompreneble „Parteitag" laŭvorte tradukita estas „partitago". Sed la sencoj tute ne kongruas, ĉar „partitago" (laŭ analizo de la vortkunmeto) esprimas rilaton de la flankelemento „partio" al la ĉefelemento „tago" (2). La senco do jene montriĝas: „tago de partio". La „tago de virino" (8-a de marto) kaj la „tago de infano" (1-a de junio) estas konataj, sed ne ekzistas „tago de partio".

Bedaŭrinde la nacilingvaj E-vortaroj, kiujn mi posedas, ne enhavas la serĉatan nocion, ĉar parte ili estas tro malmodernaj (Bennemann, Degen/Kötz) aŭ tro limigitaj laŭ la nombro de listigitaj vortoj (Krause — sed li ne kulpas tion!). La „Plena vortaro de Esperanto" laŭ sia destino nur malmultegajn vortkunmetojn enhavas.

Estas interese kontroli, kiel oni formas la vorton „Parteitag" en aliaj naciaj lingvoj. 12 uzataj nacilingvaj vortaroj donis jenan bildon:

| | | |
|---|---|---|
| angla | *party rally (3)* | --a kongreso |
| bulgara (4) | *partien kongres (5)* | --kunveno, renkontiĝo |
| ĉeĥa | *sjezd strany (6)* | kongreso de -- |
| finna | *puoluepäivät (7)* | kongreso de la -- -- tago, -kongreso |
| franca | *congrès du parti (8)* | kongreso de -- |
| hispana | *congreso del partido (9)* | kongreso de la -- |
| hungara | *pártnap, (10) pártkongresszus* | --tago, --kongreso |
| itala | *congresso (11) del partito* | kongreso de la -- |
| pola | *zjazd partii (12)* | kongreso de |
| rumana | *congresul (13) partidului* | kongreso --a |
| rusa (4) | *partijnyj s-ezd (14)* | --a kongreso |
| slovena | *zbor stranke (15)* | kunveno de -- |

Kiel videblas, la plimulto de la eŭropaj lingvoj favoras la vorton „kongreso". Ankaŭ la logiko (ne ĉiam identa kun la lingvouzo) postulas formojn kiel „partia kongreso", „kongreso de partio" aŭ koncize „partikongreso".

Interesis min, kiel oni ĝis nun en politikaj artikoloj tradukis la koncernan nocion. Montriĝis, ke sovetunianoj (16), vjetnamoj (17), poloj (18) kaj bulgaroj (19) en siaj artikoloj unuece uzas unu el la tri menciitaj formoj kun „kongreso". En la ĵurnalaro de GDR ni povas admiri buntan bildon:

1967: „VII-a kongreso de ..." (20)

1968: „partitago de ..." (21)

1969: „VII-a partikonferenco" (22) kaj en la sama verko nur 19 paĝojn poste „VII-a partikongreso de ..." (23)

1971: „VIII-a partitago" (24)

1972: „VIII-a partitago" (25).

**Konkludoj:** La kombino de „partio" kaj „kongreso" estas pli preferinda ol „Partitago".

En la redakcioj de „der esperantist" kaj „PACO" estu pli severa lingva kontrolo.

La terminar-komisiono denove ekagu kaj liveru al verkontoj kaj tradukontoj la tiel urĝe bezonatajn nociojn de la moderna vivo.

La legantoj pli atente kaj kritike studu siajn ĵurnalojn.

**Notoj:**


(1) Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto. De D-ro L. L. Zamenhof. 17. eld. 1954. Fotorepreso Rickmansworth 1969. paĝo 237.

(2) Kalocsay, Kálmán: Lingvo, stilo, formo. 3., parte tralabor. eld. Oosaka 1970. paĝo 13.

(3) Patterman, W.: Deutsch-englisches Wörter- und Phrasenbuch. Wien 1953.

(4) Transskribitaj formoj laŭ la verko „Regeln für die alphabetische Katalogisierung in wissenschaftlichen Bibliotheken". Anlage 2: Schema zur Transskription fremder Schriftarten. Leipzig 1970.

(5) Bulgarische Akademie der Wissenschaften, Institut für bulgarische Sprache. Deutsch-bulgarisches Wörterbuch. Sofia 1965.

(6) Beneš, Josef, a Adolf Plachy: Německo-česky a česko-německy kapesní slovnik. Praha 1968.

(7) Hirvensalo, Lauri: Deutsch-finnisches Wörterbuch. Osakeyhtiö 1971.

(8) Deutsch-französisches Wörterbuch. Hrsg. v. J. Haase u. R. Olivier. Leipzig 1967.

(9) Alvarez-Prada, Enrique: Langenscheidts Handwörterbuch Spanisch. Berlin, P. 2. Torin 1967.

(10) Havas, Livia: Deutsch-ungarisches Reisewörterbuch. 6. Ausg. Budapest 1969.

(11) Bidoli, Emilio, u. Guido Cosciani: Dizionario italiano-tedesco, tedesco-italiano. P. 2. Troin 1967.

(12) Piprek, Jan, u. Juliusz Ippoldt: Großwörterbuch Deutsch-polnisch. Bd. 2. Leipzig, Warszawa 1969.
(13) Academia Republicii Socialiste România. Institutul de lingvistica. Dictionar german-român. Bucuresti 1966.
(14) Nemecko-russkij slovar'. Izd. 12. Moskva 1959. (Transskribita titolo!)
(15) Tomsic, France: Deutsch-slowenisches Wörterbuch. Ljubljana 1964.
(16) PACO. Soveta eld. N-roj 4—5. 1970. paĝo 5. — Direktivoj de la 24—a kongreso de KPSU. Moskvo 1971. — Por la paco. Kajero 11. Moskvo 1971. Paĝoj 14 kaj 15.
(17) Informado. Speciala numero, suplemento al la vjetnama „PACO". Septembro 1969. Paĝo 7. — Resumo pri Vjetnamio. Hanojo 1971. Paĝo 46.
(18) Pollando. Geografio, historio, kulturo. Warszawa 1959. Paĝo 105.
(19) Nuntempa Bulgario. Jaro 3. N-ro 8/1959. Paĝo 1.
(20) der esperantist. 3. Jg. Nr. 13. Juni 1967. Paĝo 4.
(21) PACO. Eld. de GDR. N-roj 175/176. Junio/Julio 1968. Paĝo 12.
(22) Germana Demokratia Respubliko — bildoj kaj faktoj. Dresden 1969. Paĝo 36.
(23) la sama. Paĝo 55.
(24) der esperantist. 7. Jg. Nr. 48. Juli—Aug. 1971. Paĝo 1.
(25) der esperantist. 8. Jg. Nr. 53. Mai—Juli 1972. Paĝo 3.

**Rimarko de la redakcio:**

*s-ro Hamann atentigas pri tre grava problemo. Ne nur la ĝusta traduko de modernaj sociaj terminoj necesas, ankaŭ gravas ilin uzi unuece. Estas bezonataj pluaj similaj studoj, kiuj registru la ĝisnunan lingvouzon en niaj puplicaĵoj kaj kontrolu ties korektecon.*

**Internaciaj aranĝoj 1974**

CSSR

Skisemajno en Sitno, 2.—9. 3. 1974, loĝigo kaj manĝo 380 kronoj.
7.—21. 7. Somera Esperanto-Lernejo en Dudince
20.—27. 7. Kultur-turisma E-Festivalo en Ban. Bystrica, honore al la 30-a datreveno de la Slovaka Nacia Revolucio
5.—12. 8. Esp. vegetarana Renkontiĝo en Dudince
7.—8. 9. Amika Renkontiĝo E-ista

Informojn pri ĉiuj aranĝoj ĉe *Ernesto Váňa, Dudince, okr. Zvolen, Slovakio/CSSR.*

Hungario

21.—23. 6. Szolnok 25-a Hungara Kongreso de Esperanto
24.—27. 6. Szolnok, Postkongreso
7.—13. 7. Gyula, 12-a Somera Esperanto Universitato
10.—20. 7. Sikonda, 7-a Pionira Internacia Tendumado (por 10—15 jaraj esp. infanoj)
15.—24. 7. Abaliget, 7-a Internacia Renkontiĝo de Naturamikoj
4.—14. 8. Szeged Internacia Turisma Renkontiĝo
19.—24. 8. Budapest, 3-a Varia Internacia Semajno
29. 12. 1974—3. 1. 1975, Budapest 4-a Vintra Esperantista Ferio

Pro ĉiuj aranĝoj oni skribu al *Hungara Esperanto Asocio, Budapest VIII, Kenyermezö utca 6 aŭ al HEA/Turisma Komisiono H—7601 Pécs, Pf. 2*

# „Kiel plivigligi la grupojn“ (II)

En la lasta kontribuo („de 59/60, pĝ. 34—35) ni iomete provis substreki la gravecon de bone funkcianta grupo kaj por Esperanto kiel evoluanta lingvo kaj ties praktika uzado en konkrete laboranta movado. Ni ankaŭ atentigis pri la ĝenerala propaganda valoro de kursoj, sendepende de la el ĝi evoluontaj aktivuloj. Supozante, ke en mezgrandaj distriktaj urboj la ideala Subdistrikta Laborrondo Esperanto ĝenerale gvidus; *a) kursojn por komencantoj* b) *kurso(j)n por progresintoj kaj* c) *konversacian rondon* (t. e. „la klubo“) tiam ni konscias, ke de la kursestro de a) kaj b) ĝenerale multe dependas la nivelo kaj atrakcieco de la kursoj.

Sed kion pri la konversáciaj kluboj (aŭ rondoj, grupoj)? Ja principe en ili kolektiĝas la jam spertaj kaj parolkapablaj esperantistoj. Kaj ĝuste en tiuj kluboj realiĝas (aŭ devus realiĝi) plej granda parto de la politika kaj faka laboroj. Do de la nivelo, la altirforteco, la kvalito de tiuj kluboj multo dependas. Ofte oni sin demandas, kial relative malmultaj klubanoj vizitas la kunvenojn, kelkfoje ne pli ol 10 %. Kompreneble tio varias.

Ŝajnas, ke la ofte malbona frekvento de la klubvesperoj havas *kaŭzojn subjektivajn* (dependajn de la klubo mem) kaj *objektivajn* (sendependajn de la klubo). Al la subjektivaj kaŭzoj oni eble povus kalkuli malbonan gvidadon de la klubo, malinteresan programon, „diktatorecon de la spertuloj“ kaj sekve forpuŝon de komence interesitaj klubanoj ekz. gejunuloj. Al la objektivaj kaŭzoj de la malbona vizito de la klubo ofte apartenas la forta troŝarĝeco profesia de la klubanoj. Tion eĉ plej bona programo ne povas nuligi. Ni iom okupiĝu pri la *subjektivaj faktoroj*. Multo dependas de la programo. Ofte ĝi reduktiĝas bedaŭrinde je prilingvaj ekzercoj, eble de temp‘ al tempo okazas iu lumbildprelego de jam sufiĉe ofte aŭskultitaj prelegantoj. La temoj pli malpli ariĝas ĉirkaŭ Esperanto mem, do montras ofte iun introvertisman tendencon.

Certe estas pli facile skribi pri tio ol ŝanĝi la situacion. Sed tiom longe kiam niaj grupvesperoj restos sub la ĝenerala meza nivelo de aliaj kulturaj aranĝoj, la interesularo restos laŭnombre malgranda. Oni eble devus prikonsideri jenajn postulojn:

a) *pli da nivelo kaj varieco en la fakaj programoj (priesperantaj)*

b) *pli da konkreta kaj interesa apliko de Esperanto por celoj, situantaj ekster la movado,*

c) *pli da interesaj problemdiskutoj aŭ prelegoj en Esperanto pri interesaj temoj de la socia, kultura, scienca vivo en la respubliko kaj internacie,*

d) *pli da renkontiĝoj kun eksterlandanoj,*

e) *oni forlasu kiel eble ofte la tradician kadron de la temaj grupvesperoj kaj organizu specialajn aktivecojn.*

Iom konsiderante la diversajn spertojn de niaj grupoj, kiujn mi nur fragmente, kompreneble, konas, mi ŝatus fari kelkajn certe kompletigendajn sugestojn.

Pri a) Oni povus pritrakti i. a. jenajn temojn per diversaj prelegoj, diskutrondoj, subtenataj per sonbendoj kaj aliaj materialoj:

— *problemoj de la internacia esperanto-movado (ekz. neŭtraleco ĝis kia grado?)*

— *historio de Esperanto kaj konkludoj por la nuntempo (burĝa kaj laborista movadoj)*

— *pri la internaciaj Esperanto-organizaĵoj*

— *pri la movadoj en la socialismaj landoj*

— *sciencaj aspektoj en Esperanto*

— *programoj de Radio Varsovio (sonbendoj)*

— *lumbildprelegoj pri internaciaj aranĝoj*

— *kiel ni argumentu trafe pri internacia lingvo?*

— *recenzoj aŭ prezento de interesaj esperanto-libroj (ekz. Heine kaj Petöfi en Esperanto, vjetnamaj literaturaĵoj k. t. p.)*

— *komparo de tradukoj kun la originalo (ekzemple post la apero de „Nuda inter lupoj")*

— *rigardo en la esperanto-revuojn*

— *prezento de la verkaro de Zamenhof, de aliaj esperanto-verkistoj*

— *interesaj leteroj de niaj korespondantoj*

— *gramatikaj problemoj de Esperanto (granda komplekso detaligenda)*

— *traduko de vortoj kaj nocioj el la moderna socia vivo esperanten*

— *metodiko de la Esperanto-instruado k. t. p., k. t. p.*

Pri b) Se ni sub a) donis temojn iel rilatantajn al Esperanto kaj ĝia movado ni nun volas emfazi, ke ni tro ofte parolas pri la avantaĝoj de la apliko de internacia lingvo por kultura interŝanĝo k. t. p. sed tion ĝenerale nur en nesufiĉa grado praktikas. Ja estas sufiĉe pasivige, se oni nur aŭskultas prelegojn. Necesas trovi rimedojn por aktivigi tiom multe da partoprenantoj kiom eblas. Do oni devus pripensi kiel „laborigi" la klubanojn. Ĉi-teme mankas ankoraŭ spertoj. Sed mi eble ŝatus fari jenajn sugestojn:

— *komuna preparo kaj aranĝo de ekspozicioj*

— *kunmeto da materialoj por montrokestoj*

— *komuna tradukado (ĉiu ricevas parton) de prospekto pri la hejmurbo aŭ iuj vidindaĵoj de la ĉirkaŭo. Komuna kontrolado kaj pritakso de la tradukaĵoj*

— *Enprogramigo de iuj skeĉoj, kantoj k. t. p. en Esperanto, montreblaj dum iuj konvenaj okazoj*

— *helpo al aliaj faksekcioj de Kulturligo akiri iujn materialojn (ekz. por filatelistoj kaj fotoamatoroj) por fari komunajn ekspoziciojn k. t. p.*

Pri c) Feliĉe oni povas konstati, ke en multaj grupoj la programoj fariĝas pli kaj pli variaj kaj ne nur reduktiĝas je fakaj temoj. Ĉirilate ekz. la kluboj en Leipzig kaj Berlin, sed ankaŭ en aliaj urboj,

havas iom da spertoj. Ekzemple en la lasta tempo en Leipzig estis bone vizititaj la kunvenoj kun specialisto pri internaciaj problemoj, aŭ okaze de la virina tago la renkontiĝo kun vjetnamaj studentinoj.

Krom tio en la programo troviĝis tiaj interesaj temoj kiel jenaj: *Kion pensas niaj amikoj pri GDR? / Pablo Neruda estas senmorta / La 170-a tago de la morto de Johann Gottfried Herder / Pri la nova junulara kodo de GDR / Memore al Richard Wagner, okaze de lia 160-a naskiĝjubileo* k. t. p. Aŭ en Berlin oni aranĝis vesperojn pri jenaj temoj: *50 jaroj septembra ribelo en Bulgario / „Jugendweihe" (adoleska festo?) — socia aranĝo / Komuna vespero de solidareco por Ĉilio kaj la arabaj popoloj (kune kun la aliaj fakgrupoj)* k. t. p.

Trafoliumante la programkajerojn de tiuj grandaj Esperantokluboj kiel en Budapesto kaj Riga oni trovas tre interesajn temojn. En Riga ekzemple: *Nuntempaj problemoj pri la defendo de la naturo / Vespero dediĉita al Bulgario/ČSSR k. t. p. / Eventoj de la internacia vivo / Internacia Virina tago / Naturo kaj homo k. t. p.*

Aŭ en Budapesto oni i. a. traktis jenajn temojn: *Avangardistoj de la moderna hungara literaturo / Ni lernu aŭskulti muzikon (kun diskoj) / Molière kaj siaj eternaj verkoj / Pri la vivo de Koperniko / Astronomio kaj la ĉiutaga vivo / La komenco de la hungara humanismo en la literaturo k. t. p.*

Kompreneble tre oftas lumbildprelegoj pri vojaĝoj eksterlanden. Ĉiuj tiuj menciitaj temoj ja estas ege interesaj kaj klerigas jam pro la starigitaj problemoj sed ankaŭ lingve, ĉar ja necesas sin adekvate esprimi en Esperanto.

Pri d) La plej interesaj programoj kompreneble ofte realiĝas pro la ĉeesto de eksterlandaj gastoj. Eĉ se ili venas neanoncite oni eventuale forlasu la oficialan planitan programon kaj *donu al ili la parolon.* En esceptaj kazoj oni kompreneble ankaŭ povas tre koncize realigi la programon, sed necesas, ke la eksterlanda gasto havu sufiĉe da eblecoj por paroli kaj respondi demandojn.

Eble al iu tiuj linioj ŝajnas tute superfluaj. Sed la praktiko montris kelkfoje, ke ankoraŭ ekzistas grupestroj, kiuj preferas pritrakti la (enplanitan!!) akuzativon anstataŭ lasi la vorton al la hazarde ĉeestanta eksterlanda amiko.

Feliĉe la vizitoj de eksterlandaj amikoj plimultiĝas, speciale en la ĉelimaj regionoj. Do ni uzu la eblecojn de praktikado de la lingvo.

Pri e) Ĝis nun ni precipe menciis diversajn temojn, kiujn eblas pritrakti en la ĉiusemajne aŭ pli malofte okazantaj klubvesperoj. Sed necesas ekkoni kaj kompreni, ke ne sufiĉas nur kolektiĝi en la kadro de tiuj vesperoj. Ja tro abundas la vesperaj kunsidoj, ĉu interesatemaj aŭ ne, tial oni nepre ankaŭ uzu aliajn formojn de la *aktivado ekster la klubvesperoj.* Kelkaj grupoj ekzemple *vizitas muzeojn* kaj per tio lernas multajn fakterminojn. *Bestĝardenoj,* troviĝantaj en kelkaj urboj sin proponas por komuna vizito. Jen ebleco konatiĝi kun la faŭno en Esperanto. Dum somero la esperantistoj de urboj situantaj ĉe la Balta Maro faras *strandprome-*

## MEM-delegitaro en Moskvo

La ĝis nun eble plej grandan kaj plej reprezentan internacian kongreson de pacamaj fortoj, kiu okazis fine de oktobro (25.—31. 10. 1973) en la soveta ĉefurbo, ankaŭ partoprenis kvar-persona oficiala delegitaro de MEM. Apartenis al ĝi *Nikola Aleksiev*, Sofio, Bulgario, (prezidanto de MEM, reprezentanto de MEM en Tutmonda Packonsilantaro), *William Gilbert*, Tours-Francio, (ĉefredaktoro de „Paco"), *Dimitrije Bjelanović*, Beogrado, Jugoslavio, (peranto de MEM por Jugoslavio), profesoro *Sergej Podkaminer*, Leningrado, Sovetio (prezidanto de la komisiono por eksteraj rilatoj de MEM). La reprezentantoj de Japana Pacdefenda Esperantista Asocio kaj de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio bedaŭrinde ne havis la eblecon uzi siajn mandatojn. Krom tiu kvarkapa delegitaro 4 pluaj esperantistoj fariĝis konataj al la MEM-delegitaro (el Jugoslavio, Svisio, Svedio). La delegitaro plenrajte partoprenis la kunsidojn de la granda asembleo uzis la eblecojn de kunlaboro kaj estis oficiale akceptita de la *ĝenerala sekretario de Tutmonda Packonsilantaro s-ro Romesh Chandra*. TPK kaj MEM subskribis kontrakton pri kunlaboro. Tio signifas, ke la plej prestiĝa internacia pacmovada organizaĵo kontraktis kun MEM, kio ne nur por la prestiĝo de MEM sed por la tutmonda esperanto-movado estas netakseble grava evento.

La *Moskva Internacia Esperantista Klubo* (MIEK) akceptis la 28. 10. 73 la esperantistajn gastojn. Dum la solenaĵo estas transdonita la honorinsigno de MEM al la meritplenaj esperantistaj-pacbatalantoj *prof. Podkaminer, K. M. Gusev* kaj postmorte al *prof. Bokarev* kaj *Nina Sulje*.

Pluaj detaloj pri la laboro de la MEM-delegitaro sekvos en n-ro 63 „der esperantist" (= 1/1974).

---

### Libroj por Vjetnamio

Modelan solidarecon montras la esperantistoj de Leipzig (Lajpcig). Ĝis la 8a de decembro 1973 ili kolektis pere de ligo-amiko Albert Weinhold por Vjetnamio 261,50 M kaj por Ĉilio 82 M. Krome ili decidis sendigi solidarece 50 „Nuda inter lupoj" de Bruno Apitz al Vjetnamio.
Kiu distrikto aŭ grupo sekvos tiun ĉi bonegan ekzemplon?

---

(resto de pĝ. 20)

*nojn* k. t. p. Kaj kial ne mendi rezervitan tablon en iu *dancdiskejo*, kie sin kolektu dancemaj esperantistaj junuloj? *Semajnfinaj komunaj tendadoj aŭ ekskursoj*, komune kun la familianoj, kompreneble, aŭ *karnavala vespero* same utilas. Do ekzistas multaj eblecoj kaj spertoj ĝeneraligendaj ĉirilate.

Mi provis skizi kelkajn eblecojn de varia klubagado, konsciante pri tio, ke certe multaj grupoj povas aldoni eble pli bonajn spertojn.

Tial diskuto pri la prezentitaj problemoj estas tre bonvena. *Do ni atendas viajn opiniojn kaj sugestojn kaj volonte raportos pri tio en „der esperantist".*

*(daŭrigota) D. Blanke*

# Letero al la redakcio

## Sovetoj junuloj somere 1973

*Kara redakcio!*

*Per tiu letero mi plenumas mian promeson rakonti pri somera renkontiĝo de junaj sovetaj esperantistoj...*

Julio kaj aŭgusto estas la plej turismaj monatoj de jaro. Homoj renkontiĝas, vizitas proksimajn kaj forajn landojn, interŝanĝas manpremojn, ridetojn, suvenirojn, ideojn, pensojn. Kaj en la maro de gastamo aperas insuloj de amikeco inter homoj, ĉar tie al ĝi ne malhelpas la lingvaj baroj — tiuj insuloj konsistigas grandan arkipelagon Esperantujo.

En la mezo de la aŭgusto la vagonaron Riga-Jurmala plenigis gejunuloj, parolantaj la lingvon de tiu fabela lando. Gastamaj riganoj, kutimiĝintaj al fremda parolo surstrate de sia urbo, tamen ekmiris: „Italiano, espanjola? Ne? Neimagebla — Esperanto! Kaj vi mem, de kie vi venis?“ Sed la respondoj diversis. Latvo Andris Natinj alvenis Rigan el Petropavlovsk-sur-Kamĉatka, kie li delonge loĝas kaj maristas, docento Boris Tokarev venis el Moskvo, instruisto Anatolo Gonĉarov — el Barnaŭlo. Tiel demandinte pasaĝeron de la trajno, oni povis konatiĝi kun preskaŭ ĉiuj lokoj de nia vasta lando: Ufa kaj Ĥmelnickij, Mahaĉkala kaj Tula, Taŝkento kaj Vilniuso, Tallin kaj Ustj-Kamenogorsk — ĉiujn eĉ nombri neeblas!

Tamen al la XV kunflugo [1]) de esperantistoj ĉe Riga strando venis ankaŭ homoj el eksterlando. Skarlata uniformo kun soveta blazono sur brusto de Galina Lenskaja ne restigis dubojn, kiun landon ŝi reprezentis en Berlino dum la tutmonda festivalo por junularo kaj studentoj. Leĝera latva prononco, kiu tamen sonis en esperanta parolo de Znotinj, malkovris lian apartenon al la respubliko, en kiu okazis la kunflugo. Tamen ili ambaŭ venis al Latvio el eksterlando, Galja — el Berlino, Znotinj el Beogrado, kie antaŭnelonge okazis la 58a UEA-kongreso.

Kesterciems. Subĉiela estrado en uzina ripozejo de radioproduktejo laŭ nomo de Popov. Ĉi-tie kunvenis ne nur 250 esperantistoj sed ankaŭ centoj da ripozantoj, inĝenieroj kaj laboristoj. Intervenas delegitino de la tutmonda festivalo por junularo kaj studentoj G. Lenskaja. Ŝi rakontas pri la unika dumfestivala renkonto, kie reprezentantoj el multaj landoj interkomunikiĝis sen interpretistoj, pri anglaj komsomolanoj, kiuj vaste uzas Esperanton por propagandi ideon de paco kaj socialismo, montras koloran revuon „Juneco“, kiun niaj samideanoj el GDR eldonis speciale okaze de la festivalo, kaj sovetajn E-librojn, kiuj aperis antaŭnelonge en Moskvo, Tallino, Riga kaj Kievo.

— „Diru pri kantoj. Ĉu oni ankaŭ kantas esperante?“

Tion uzinanoj, ekinteresiĝintaj per la rakonto pri la festivalo, demandas la esperantistojn. Oni invitas la lokanojn al la klubo, kie vespere disaŭdiĝas sondisko, ĵus aperinta en Vilniuso. „Litova kanto en Esperanto“. Kantas profesia ensemblo „Estradaj melodioj“, akompanas orkestro por leĝera muziko de Litovia radio kaj televido. Pri tio informas trilingva teksto sur kolora koverto de la sondisko — litove, ruse kaj esperante —

pri historio de la lingvo internacia, ĝia uzo en lernejoj kaj institutoj litoviaj. En la halo ĉeestas la tradukinto de la plejmulto el la kantoj. Vitas Šilas, partopreninto en preskaŭ ĉiuj 15 kunflugoj de junaj esp-oj, unu el la gvidantoj por la klubo „Juneco", pri kiu ankaŭ tekstas la koverto.

Engure kaj Kesterciems, du latvaj vilaĝoj, kiuj gastigis la E-konferencon kaj la XV SEJM-kunflugon, por du semajnoj transformiĝis en du insuloj el arkipelago Esperantujo kaj okazis sur krucvojoj, kiu ligas diversajn landojn.

Nia organizanto rigano Aristid Medinjŝ partoprenis nur la konferencon en Engure. Kiam esperantistoj transloĝiĝis al Kesterciems, li estis jam fore kaj alte, ĉar la turisto forflugis al Benelukso. Nederlando, ekzemple, ne estis por li tute nekonata lando. Pri ĝi rakontis al Aristid partopreninto en ĉi-landa UEA-kongreso A. Gonĉarov. Same en Nederlando la samideanoj salutis la patron de la kosmonaŭto S. P. Titov, esperantan poeton kaj membron de du akademioj, sovetia kaj esperanta, S. Obruĉev ... Medinjŝ vojaĝis al alia regiono de Esperantujo.

Kaj alia latvo, Znotinj, revenis de la ĉefa insulo de tiu fabela arkipelago, el Beogrado al verda vilaĝo Kesterciems. Li aperis sur podio de la uzina ripozejo kaj ekŝajnis — malantaŭ la fenestroj fratas Jugoslavio, flirtas flagoj de multaj landoj. Ekŝajnis: la halo plivastiĝis kaj kunigis kongresanojn, ligitajn per la lingvo de paco kaj amikeco.

Sed ĉu ne similis al negranda E-kongreso nia 250-homa dektaga kunagado? Dek, se ne kalkuli tiujn kvar en Engure, kie 80 E-aktivuloj, plejparte junularo, detale raportis pri la movado en urboj kaj pridiskutis koordinon de nia agado. La tendaro en Kesterciems estis ege instrua, ĉar ne estis eĉ unu homo, kiu ĉiutage ne okupiĝis pri Esperanto. Unuj partoprenis kursojn, gviditajn de veteranoj — Rogov, Skvorceva k. a., aliaj ĝuis altnivelan tradukistan rondon instruatan de Samodaj kaj Arolovič, sed eĉ la plej spertaj esperantistoj ne restis sen okupo, ili dividis sian tempon inter primovada lernejo (gvidanto docento Podkaminer) kaj Somera Universitato, kiun gvidis doktoro pri filologio Moskovič. En la unua aranĝo oni dum 14 horoj pridiskutis la E-movadon de antaŭrevolucia periodo ĝis nuna tempo.

K-do Podkaminer lekciis pri 20 — 30 jaroj surbaze de propraj rememoroj. Aparte estis pridiskutataj la historio de UEA, de TEJO kaj de SEJM kaj la laboro de la E-komisionoj ĉe Sovetaj Unuiĝoj por amikeco. Fine okazis kolokvo, dum kiu lernantoj respondis demandojn. Estis decidite daŭrigi la primovadan lernejon dum venontaj tendaroj.

Diversaj temoj estis prilumitaj dum la SU[3]). Docento Vaitilavičius parolis pri la fama prepozicio „de". La plejmulto refutis iun ajn reformon, kiun ankaŭ ne subtenis la preleginto. La doktoro pri matematiko el Leningrado, Cejtin, prelegis pri „Internaciaj kaj intermaŝinaj lingvoj" kaj docento Kulikov el Omsko pri matematikaj terminoj en E (faka kunveno inter matematikistoj, kiu okazis eksterkadre de SU, estis la plej vigla). Docento el Moskvo, Tokarev, faris du prelegojn — pri psikologio de E-instruado kaj „Provo de estetika analizo de verkoj de N. Holov" (aldone Tokarev lekciis apartan kurson pri E-literaturo). La verkistino el Kiev, Andrianova, intervenis pri E-stilo, V. Cvetkova — pri bibliografio en E.,

**Sub la ardanta ĉielo de Uzbekio**

La vizaĝon de Talis Bercis brunigis la ardanta suda suno. La estro de konstrubrigado „Esperanto“ de latvaj studentoj ankoraŭ plenas je priuzbekiaj impresoj. — Estis varmege kaj tre lacige. Ni estis 52 junaĝaj esperantistoj el Riga, Vilnius, Omsk, Uljanovsk, Taŝkent, Sverdlovsk. La latva grupo estis la plej ampleksa. Ni laboris en koton-vinbera kolĥoso „Palendara“, situanta 75 km for de Samarkand, por estigo de irigacia kanalo. La kolĥozanoj planis plenumi la laboron dum unu jaro. Sed danĸ' al nia helpo ĉio konstruiĝis dum unu monato. Perlaboris ni kontentige, por la reen-veturo ni ricevis eĉ premiojn kaj donacojn. La tuta tendara ordo kaj laborterminaro estis esperantigita. Pliperfektiĝi en tiu ĉi lingvo al ni helpis specialaj kursoj.

La taĉmento de esperantistoj situis en nuksarba bosko sub stelplena ĉielo. Noktiĝis subite sen ia krepuskiĝo. Same sub la stelplena uzbekia ĉielo okazis artamatoraj koncertoj — en naciaj lingvoj de junuloj kaj en Esperanto, okazis gajaj renkontiĝoj, laŭ speco de „Klubo de gajaj sprituloj. Junuloj kaj knabinoj partoprenis multajn ekskursojn en Uzbekio, precipe memorinda estis la ekskurso al la antaŭmontaro de „PAMIR“. Inter alie dum la konkura ascendado Talis unua atingis la celitan supron.

Pro la rimarkindaj rezultoj de farita laboro, modela gvidado de la labortaĉmento Talis Bercis ricevis honorateston. Venontjare li ree renkontiĝos kun siaj amikoj, sed nepre en alia laborloko.

*G. Jazep*

---

(resto de pĝ. 23)

docento Podkaminer aparte rakontis pri sia korespondado kun la akademiano Filin [2]) okaze de lia intervjuo en „Literaturnaja gazeto“.

Leginte tiun, oni ne imagu, ke la kunflugo transformiĝis al ordinara E-lernejo. Ĉiuvespere en la klubo okazis koncerto de alia regiono Ĉebaltio, Eŭropa Rusio, Siberio kun Uralo. Por koncerti al Kesterciems venis el Riga niaj blindaj samideanoj.

Entute ni ĝuis bonan kunlaboron kun la vilaĝanoj. Unu tagon la tuta tendaro laboris en kolĥozo kaj pro tio akiris „Koran dankon“ (en E.) kaj tri kestojn da ĵuskaptitaj fiŝoj, kiujn oni volonte formanĝis dum adiaŭa tutnokta balo inter la elektoj de „mis“ kaj „mister“ Esperanto (kaj ankaŭ gesinjoroj Krokodiloj) Aparte interesa estis la konkuro KGS (Klubo de gajaj kaj spritaj), kie tradicie batalos teamoj „Oriento“ kaj „Okcidento“, sed venkas bona humoro, sprita humuro kaj flua Esperanto. Venis la lasta tago. La mastroj ornamas la plej aktivajn gastojn per donacoj. La partoprenantoj dankas la organizintojn kaj aparte la sindonan laboron de Inara Medine kaj Ajvors Kalninŝ. Koran dankon ili esprimis al la gvidantaro kaj laboristoj de la Popovuzino, kies morala kaj materiala helpo sukcesigis la SEJT-15. Foriris la lasta aŭtobuso. Sed tamen ni certas — pasos la jaro kaj nia laboro denove naskos nian renkontiĝejon, dum nova aŭgusto en nova loko.

*A. Ĥarkovskij, Moskvo*

[1]) Kunestado neformala kun pli malpli fiksita programo
[2]) Tre fama soveta lingvisto
[3]) SU = Somera Universitato

# *Asen Grigorov - 70 jara*

*La jubilea parolado de Ĥristo Gorov*

*La esperantistoj de GDR vidas en Asen Grigorov unu el la plej noblaj reprezentantoj de la bulgara esperantistaro. En Asen Grigorov enkorpiĝas la plej bonaj tradicioj de la progresama bulgara esperantista movado, movado gvidata de tiuj ĥomoj kiel la jubileulo. Jen unu el la kaŭzoj por la granda estimo, kiun la bulgara movado en tutmonda skalo ĝuas. Represante la prelegon de k-do Gorov ni aliĝas al la plej varmaj kaj amikaj bondeziroj por nia altestimata kaj ŝatata bulgara amiko kaj kamarado.*

*Centra Laborrondo kaj la redakcio „der esperantist“*

La sukcesplena evoluo de la E-movado en nia lando, ĝia aŭtoritato ŝuldiĝas al la aktiva, persista kaj sindona laboro de kelkcentoj da gvidantoj, kiuj dum jardekoj dediĉas sian energion por esperantigi novajn adeptojn kaj multigi nian anaron, por eldoni lernolibrojn, vortarojn, gazetojn, legaĵojn.

Unu el tiuj elstaraj kaj nelacigeblaj pioniroj estas kamarado Asen Grigorov.

Pasis pli ol kvar jardekoj de la jaro, kiam mi konatiĝis kun Grigorov en lia modesta dometo sur strato „Oĥrid“. Tiam li loĝis kun sia estimata edzino Ljuba en la proleta kvartalo de Sofio. Eble ankaŭ tiu cirkonstanco havis sian influon al la vivovojo de Grigorov.

En tiu kvartalo li observis ne nur la mizerantajn laboristajn familiojn. Li observis kaj admiris la batalantojn, kiuj alten levis la standardon de l'komunismo. Tiutempe la centro de Sofio apartenis al la burĝaro, al altrangaj oficistoj, bankdirektoroj, oficiroj kaj politikaj agantoj. La revolucia forto de la Komunista Partio ŝprucis en la malriĉulaj kvartaloj de la ĉefurbo, kie loĝis fuĝintoj el Makedonio, apudegea Trakio kaj Dobruĝa. Kiam fondiĝis *Laborista Esperanto-Asocio*, Asen Grigorov elpaŝis per siaj verkoj dum niaj kunvenoj kaj konferencoj.

Li gajnis nian simpation ne nur per sia modela karaktero, sed ankaŭ per siaj poeziaĵoj, en kiuj spiris la strebo al socia libereco, bolis malamo al subpremantoj kaj faŝistoj.

En la komenco de la tridekaj jaroj sub titolo „Ruĝa Aŭroro“ aperis bukedo da revoluciaj poemoj. Ĉi versaĵoj laŭdas la klasbatalantojn, alvokas nin defendi la sovetan popolon, esprimas la kredon de la aŭtoro je la fina venko. Por ni ĉi tiu malmultpaĝa libreto, subskribita per la pseŭdonimo *„Ljubin“*, estis vera ruĝa aŭroro, radianta super la horizonto. Dum la faŝista diktaturo, kiam furiozis la cenzuristoj, estis vivdanĝere streĉi la kordojn de la proleta liro kaj prikanti la liberecon. Por Asen Grigorov tio estis multe pli danĝera, ĉar li oficis en diversaj ŝtataj institucioj — *Ministerioj de Popola Klerigo*, de *Internaj Aferoj*, de *Poŝto*

*kaj Telegrafo.* Tiam la faŝistaj aŭtoritatuloj severe persekutis ĉiujn bulgarajn verkistojn kaj ĵurnalistojn, kiuj staris ĉe flanko de la klaskonscia proletaro kiel politika avangardo. Ĉe tiaj cirkonstancoj A. Grigorov sentime daŭrigis sian verk-laboron por progresemaj esperantistoj.

Do, Grigorov komencis sian Esperanto-laboron antaŭ duonjarcento. Unuа li kunlaboris al *„Bulgara Esperantisto“* kaj *al „Balkana Konkordo“*. En la fino de la tridekaj jaroj li kune kun *Nikola Aleksiev, Atanas Lakov* kaj *Simeon Petrov* partoprenis la redaktadon kaj eldonadon de *„Balkana Laboristo“*.

Dum la sama periodo en nia E-movado formiĝis taĉmento da tradukistoj kaj originale verkantaj — *Ivan Dobrev, Dimitr Zlatarski — Miti, Ĥrima D. Sasonov, Kruco, A. Lakov* — kiuj enviciĝis post A. Grigorov. Iliaj verkoj aperadis ankaŭ en internaciaj ĵurnaloj: *„Sennaciulo“* (antaŭskisma periodo), *„La Nova Epoko“*, *„Internaciisto“*, *„La Praktiko“*, *„Heroldo de Esperanto“*, *„Verda Stelo“* k. a.

Gravan rolon ludis la gvidata de Nikola Aleksiev gazeto *„Rabselkor“*. Ĝi estis taksata kiel la pli juna frato de *„Pogled“*. Al ĝi aligis siajn fortojn A. Grigorov. En tiu ĉi periodaĵo plej ofte aperadis korespondaĵoj de sovetaj laboristoj-esperantistoj. Dank' al tio *„Rabselkor“* tre efike propagandis la atingaĵojn de la socialismo en la unua laborista-kamparana ŝtato — USSR.

Dum la jaroj 1937—1938 A. Grigorov fondis kaj redaktis la Esperantopaĝon de la ĉiutaga ĵurnalo *„Zarja“*.

Krom en la gazetoj li laboris ankaŭ kiel vortaristo kaj kompilanto de lernolibroj.

Mi devas akcenti, ke lia Esperanto-agado ne lasis lin stari flanke de la organizita laborista movado, gvidata de la Komunista Partio.

Lia partieca kaj popoleca verkado estas ŝuldata al la komunistaj ideoj. La laboristan movadon li ne subtenis flankestarante de la ĉiutaga batalo, sed jam en 1928 j., kiam fondiĝis RMS *(Laborista Junkomunista Unuiĝo)*, li aliĝis al ĝi. Post unu jaro oni lin akceptis en la vicojn de la Partio. En ĝi li ne restis nura soldato. Oni elektis lin sekretario de partia ĉelo ĉe la Ŝparkaso, kiu tiutempe funkciis en la kadroj de Ministerio de Poŝto kaj Telegrafo. Samtempe li estiĝis membro de partia komitato en la centra parto de Sofio.

Sed ĉiam lia preferata okupo estis la verkado. Li redaktis kaj eldonis *„Kablo“*, *„Telefono“*, *„Telegrafopoŝtisto“* k. a. nelegalajn gazetojn.

Denuncantoj ekflaris lian agadon kaj sekvis eksigo el la oficejo. Asen Grigorov fariĝis profesia revoluciulo. Sub direktado de *Vlado Georgiev* li laboris en nelegala presejo de Centra Komitato de la Partio. En 1941 j. la polico malkovris la presejon kaj kaptis la redaktorojn kaj la teknikajn kunlaborantojn. Asen Grigorov eniris la Centran Malliberejon en Sofio. Li restadis en la prizonoj de Sofio, Pleven, Blagoevgrad, vilaĝo Breĵane. Ankaŭ ĉi tie, en la ĉeloj, li daŭrigis sian agadon; li sukcesis organizi kaj eldoni esperantlingvan mane skribatan gazeton *„La Kajero“*.

Grigorov eliris el la prizono en 1943 j. La faŝista teroro estis senindulga. Tamen li ne kapitulacis antaŭ la obstakloj. La Ruĝa Armeo, kiun li atendis jam dudek jarojn, proksimiĝis al la norda limo de Bulgario. Tio estis signalo por ribelo. Je la 6-a de septembro 1944 j. Grigorov partoprenis la stratajn demonstraciojn en Sofio.

Oni arestis kaj malbontraktis lin. Malgraŭ tio li faris sian devon kiel ribelulo. La 9-an de septembro li renkontis kun ĝojo kaj entuziasmo la unuan vere popolan registaron en Bulgario.

Kiel fidela kaj konsekvenca kontraŭfáŝisto li estis enoficigita en la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio.

*Kiam el Sovetunio revenis Georgi Dimitrov, Grigorov fariĝis lia unua sekretario.* Pli poste li transiris al la Komitato de Ŝtata Kontrolo, kie li redaktis la revuon „*Ŝtata Kontrolado*".

En 1958 j. li emeritiĝis, sed por li tio ne signifis ripozo. Li dediĉis sin tute al la Esperanto-movado.

Dum la jaroj 1945—1949 Grigorov estas ĉefredaktoro de „*Internacia Kulturo*". Post ties ĉesigo li fariĝis ĉefredaktoro de „*Nuntempa Bulgario*".

Tiu periodo estas treege fruktodona kaj utila por nia lando, konstruanta socialismon. „Nuntempa Bulgario" havis pli ol *10 000 abonantojn* en la tuta mondo. Dank' al ĝi la monda esperantistaro informiĝis pri la novaj vivkondiĉoj en nia lando, pri la rimarkindaj atingaĵoj de nia libera popolo. Asen Grigorov penadis ĉiel por fari „Nuntempa-n Bulgario-n" serioza kaj enhavoriĉa revuo. Li arigis ĉirkaŭ la Revuo junajn esperantistojn, utiligis la spertojn de la maljunaj.

„Nuntempa Bulgario" regule aperigis artikolojn kaj ilustraĵon pri la socialisma konstruado en niaj urboj kaj vilaĝoj, skizojn kaj raportaĵojn pri la novaj homoj de Bulgario, tradukojn de klasikaj kaj nuntempaj aŭtoroj. Sur la paĝoj de la revuo oni ĉiam trovis interesaĵojn pri la Esperanto-movado — nacia kaj internacia. „Nuntempa Bulgario" konkeris por si ŝatindan lokon en la tutmonda esperantista gazetaro.

Post la ĉesigo de „Nuntempa Bulgario" A. Grigorov ne krucis la manojn. Li estas la fondinto kaj gvidanto de la Literatura Esperanto-Rondo en Sofio kaj unua prezidanto de la Sekcio de *Esperantistaj Literatoroj en Bulgario* (SELEB), redaktas la kelkjaran bultenon *„Interligilo"* organo de la *Internacia Ligo de Poŝtistoj-Esperantistoj.* Li ankaŭ estas redakciano de *„Bulgara Esperantisto"* kaj de *„Juna Amiko"*, aperanta en Hungario. Sub liaj zorgoj maturiĝas novaj Esperanto-poetoj kaj verkistoj en nia lando.

Kiel la bulgaraj esperantistoj, tiel ankaŭ la internacia esperantistaro, kiu ofte invitis lin al siaj kulturaj aranĝoj tre alte taksas Asen Grigorov.

Tion li atingis per sia modesta vivmaniero, per sia originala verkaro, per la multnombraj tradukoj el la bulgara lingvo, modelaj laŭ lingva vidpunkto, per siaj lernolibroj kaj vortaroj, destinitaj por lernado kaj perfektiĝo en la Internacia Lingvo.

*La Kultur-Kleriga Komisiono de la Centra Komitato de Bulgara Esperanto-Asocio eldonis 1973 omaĝe al la armita ribelo de la Komunista Partio en septembro 1923 literaturan kajeron sub la titolo*

**„Septembro estiĝos majo" en la redakto de Asen Grigorov**

Tiu ĉi turnpunkto en la bulgara historio respeguliĝas multflanke en la literaturo, kiel pruvas ĉi tiu kajero, entenanta poemojn, versaĵojn, rakontojn, baladojn kaj 3 romanfragmentojn, indajn, esti uzataj por la celebrado de la 50-a datreveno de la Septembra Ribelo.

En unu romanfragmento kaj unu rakonto ni renkontas Dimitrov, nome en „Protekto" kaj „Popo Andreo". Protekton donis la edzino de la mortinta kamarado Donĉo Stanĉev al Dimitrov, kiam li devis sin kaŝi en ŝia domo. Tiu ĉi fragmento el la romano „Septembruloj" de Emil Koralov bone taŭgas, esti voĉlegata dum la celebrada vespero en klubejoj. Same bone uzebla estas la rakonto „Popo Andreo". En klara, bona stilo estas rakontata la kuraĝa agado de la popo ribelinta, kiun faŝistaj oficiroj pendigis.

Ne malpli impresaj estas la poemoj precipe tiuj de Asen Grigorov: „Nikodim", „La lasta batalo ĉe Bojĉinovci", kaj „Vintra teroro". Sed legindaj estas ĉiuj. Resumante oni povas aserti, ke tiu ĉi kajero precipe por nebulgaraj Esperantistoj donas valoran helpon kaj por la konigo de la unua popola kontraŭfaŝista ribelo kaj por tiurilata celebrado.

*Hella Sauerbrey*

**La 5-an de decembro 1973 la esperantistoj el Berlin, en la klubo 72, konatiĝis kun la supre prezentita literatura kajero. La enkondukon kaj prezenton faris sinjorino Hella Sauerbrey.**

---

(resto de pĝ. 27)

Pro sia duonjarcenta laboro A. Grigorov ricevis antaŭ nelonge altan ŝtatan ordenon.

50 jarojn por Esperanto! Dum tiuj 50 jaroj li enmetis multajn orajn brikojn en la fundamenton de nia konstruaĵo.

En la nomo de la Centra Komitato de BEA, kies membro Asen Grigorov estas depost 1945 j., mi tutkore deziras, ke li restu ankoraŭ longajn jarojn junkora kaj verk-kapabla, ke li laboru por nia Movado kun la sama persisto, aktiveco kaj sindono.

Kune kun miloj da bulgaraj esperantistoj mi salutas lin: Gratulon kaj plenforte al la 80-a!

*(El „Bulgara Esperantisto" 4/5 1973)*

# Esperanto-kursoj en Burgas

Jam kvinan jaron la Instruista Sekcio kaj la Sofia Distrikta Komitato de Bulgara Esperantista Asocio organizas *porinstruistajn Esperanto-kursojn* sub aŭspicio de Internacia Ligo de Instruistoj-Esperantistoj (ILEI). Dum la lernojaro la bulgaraj instruistoj studas foreste (koresponde). Ĉiumonate ili solaj preparas kontrolekzercojn kaj unu fojon kolektiĝas en iu centra loĝloko por havi ĉeestajn lecionojn sub la gvido de ilia kursestro. En la somera ferio oni organizas 20-tagajn Esperanto-kursojn por instruistoj. Jam la trian jaron tiuj kursoj okazas en la urbo *Burgas ĉe la Nigra Maro.* (6. — 25. 8. 1973)

Ĉi-jare mi havis la eblecon viziti kaj partopreni la kursojn en Burgas. Aliĝis *153 geinstruistoj,* inter kiuj estis *126 bulgaroj* kaj *27 alilandanoj* (el *ĈSSR, Hungario, GDR, Pollando kaj Rumanio.* Bedaŭrinde nur partoprenis 3 personoj el GDR.) Formiĝis 3 elementaj grupoj kun 70 partoprenantoj, 2 grupoj duagradaj kun 52 partoprenantoj kaj unu grupo de kandidatoj por akiri instrurajton — kun 15 partoprenantoj. Krome funkciis seminaria grupo el 10 partoprenantoj.

La elementaj kaj la duagradaj grupoj havis konstantajn gvidantojn *(A. s-inoj Penka Kateva, Vâlka Dankova, sro Dimitr Canev, B. s-roj Jordan Angelov, Violin Oljanov);* en la tria grupo kaj en la seminario laboris 3 gvidantoj, du hungaraj s-roj *Z. Gyormati* kaj *Tibor Vasko,* kaj unu bulgara, s-ro *Kunĉo Vâlev,* (ĉefredaktoro de la revuo „Bulgara Esperantisto“ kaj lektoro de Esperanto en la Sofia Universitato) kiu ankaŭ estas la ĉefa metodika gvidanto de la kursoj, ĉar en tiuj grupoj krom la *lingvo* oni studis ankaŭ *metodikon, historion de la Esperanto-movado kaj Esperanto-literaturon.* Laŭplane ĉiuj kandidatoj por diplomiĝo faris praktikajn lecionojn en la antaŭaj grupoj, kiuj estis pridiskutataj.

La kursoj finiĝis per ekzamenoj. La ekzamenon A faris sukcese 54 personoj, ekzameno B — 28 personoj [1]) kaj ekzamenon C (por instrurajto) — 12 personoj. Tio, kio estas aparte grava: la ekzamenkomisiono por ekzameno C formiĝas laŭ ordono de fako „Klerigo“ (Instruado) ĉe la Distrikta Popola Soveto kaj la diplomoj por instrurajto estas oficialaj, ilin eldonas ŝtata organo.

Dum la tuta tempodaŭro de la kursoj en la grupoj regis fervoro kaj entuziasmo, vere nobla konkurado por ekregi la Internacian Lingvon. La plejparto de la kursanaro estis junaj homoj. Tiamaniere oni celas plijunigi la Esperanto-movadon en Bulgario kaj kreskigi bonajn, kompetentajn gvidantojn de Esperanto-instruado en lernejoj, ĉe kulturdomoj, en kvartaloj k. a.

La loĝejo estis tute nova, granda, 4-etaĝa konstruaĵo. Ĉi-tie troviĝis ankaŭ la pli granda parto de la klasĉambroj. Pri loĝejoj kaj klasĉambroj oni povas diri, ke ili estis bonaj kaj sufiĉaj. La manĝado estis bulgarmaniera.

En la daŭro de 20 tagoj inter la kursanoj kreiĝis tre bonaj rilatoj de amikeco, la kursanaro ekvivis kiel tuteca idea kolektivo, entuziasma pri la ideoj de la internacia lingvo Esperanto kaj la Esperanto-movado. Antaŭ tagmezo oni lernis, posttagmeze oni iris al la plaĝo por ĝui la sunon kaj la varman maron ĝis la plena satigo. En la dimanĉaj tagoj estis organizitaj ekskursoj (la plej bela estis al rivero Ropotamo), amuzoj kun dancoj, belartaj programoj kiam libervole manifestiĝis la diversaj talentuloj el la kursanoj kaj gvidantoj.

# Feriado en Bulgario

**Jen la ĉiujare organizataj aranĝoj en Bulgario:**

**VINTRA ESPERANTO-SEMAJNO**

(Sub aŭspicio de la asocio MONDA TURISMO)

Ĝi okazas del a 1-a ĝis la 7-a de februaro en la ripozdomo de APK „DIMITAR BLAGOEV“, en la restadejo PAMPOROVO.

La restadejo Pamporovo situas je 1600 m super la mara nivelo, 84 km for de urbo Plovdiv, en la meza parto de Rodopi-Montaro. De Plovdiv al Pamporovo oni veturas per aŭtobuso. La Restadejo estas la plej bona bulgara altmontara ripozejo. Pro la monta karaktero de la tereno kaj la forta influo de la Mediteraneo la klimato distingiĝas per milda vintro kaj freŝa somero. La Vintra Esperanto-Semajno okazas en periodo, kiam estas abunda neĝo kaj oni organizas multe da skikonkursoj.

La partoprenantoj ekskursos piede, per montaj liftoj kaj aŭtobusoj al montopinto „Sneĵanka“ (Neĝulino), al etnografia muzeo en urbo Smoljan kaj al malnova vilaĝo Ŝiroka Laka. En la programo ankoraŭ estas: glitado, skiado, prelegoj, spektado de lumbildoj, grupaj ludoj kaj kantado k. a. Partoprenkotizo — 33 levoj. Bulgaroj pagas 24 levojn. La pago estas por dormado, manĝado, ekskursoj kaj enirbiletoj.

La partoprenantoj ricevos la unuan manĝaĵon la 1-an de februaro je tagmezo kaj la lastan la 7-an de februaro matene.

*Aliĝilojn kaj detalan programon sendas la Distrikta Esperanto-Komitato, PK 30, Smoljan, Bulgario.*

**ORA ESPERANTO-FERIADO**

(Sub aŭspicio de la asocio MONDA TURISMO)

Ĝi okazas de la 14-a ĝis la 24-a de septembro en la restadejo kaj la ripozdomo, kie okazas la Vintra-Esperanto-Semajno. La programo estas varia por ke ĝi kontentigu ĉies gustojn. Al petantoj ni sendas aliĝilon kaj detalan programon.

**INTERNACIAJ ESPERANTO-KURSOJ**

por komencantoj kaj progresantoj je ĉiu 1-a kaj 16-a tago de la monato de la 1-a de junio ĝis la 31-a de oktobro en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica for 6 km de Smoljan, kiun konstruis kaj posedas nia Komitato. Aliĝilojn kaj programon ni sendas al petintoj.

*DISTRIKTA ESPERANTO-KOMITATO*
*PK 30, Smoljan, Bulgario*

---

(resto de pĝ. 29)

La Instruista Sekcio kaj la Sofia Distrikta Komitato de Bulgara Esperantista Asocio havis bonan iniciaton kaj sukcese ĝin realigas: prepari E-instruistojn el inter la profesiaj instruistoj. En Burgas kreiĝis vera 20-taga E-lernejo, kie instruistoj el diversaj landoj ne nur lernas la lingvon, sed ankaŭ praktike edukiĝas en spirito de amikeco, paco kaj internaciismo. Estas rekomendinde, ke tiaspecajn E-aranĝojn partoprenos ĉiam pli alta nombro de instruistoj, sed ankaŭ certa kvanto de neprofesiaj instruistoj kun almenaŭ mezgrada instruiteco por plinombrigi la rondon de kvalifikitaj E-instruistoj ankaŭ en nia respubliko. Garantio por tio estas la seriozaj zorgoj kaj penado de niaj bulgaraj samideanoj organizi la kursojn altnivele.

*Ruth Schonert*

1) Al kiu ankaŭ apartenas la verkintino. Ni kore gratulas. Red.

# Esperanto - ciam pli grava kulturfaktoro

*El raporto de Hungara Esperanto Asocio*

...Post la fino de la dua mondmilito pasis preskaŭ 15 jaroj, kiam HEA povis serioze daŭrigi la kontribuojn al nia kulturo. Per eldono de *Hungara Vivo* en 1961 komenciĝis la nova epoko de tiuj kontribuoj. Per kunlaboro de niaj eminentaj verkistoj kaj tradukistoj ni aperigas jam en la dekdua jaro tiun ĉi altnivelan kulturan revuon, respektatan kaj ŝatatan en la tuta mondo.

Ni rememoru pri nia *51-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto,* kiam ni aranĝis la ĝis tiam plej grandan Internacian Artan festivalon kun impona sukceso. En pli malgrandaj kadroj, tamen kun konsiderinda efiko ni aranĝis en 1972 Hungaran *Kultur-festivalon.*

La *Pedagogia Sekcio de HEA* enkondukis la sistemon de ekzamenoj en tri kategorioj: A, B, C. Post la finitaj kursoj la studentoj faras ekzamenon kaj ricevas atestilon. La eblo por la ekzameniĝo, krom la instigo al la lernado, donas ankaŭ memfidon, eĉ rangon inter la esperantistoj. Treege impona kontribuo al la Esperanta kulturo estas la libroeldonado. Malgraŭ financaj malhelpoj kaj presejaj malfaciloj la *libroeldonado de HEA,* kune kun la libroeldono de „Tankönyvkiadó" (Ŝtata eldonejo de Lernolibroj), de la eldonejo „Corvina", kaj de la Akademia eldonejo „Terra" — ankaŭ mondskale estas respektindaj.

Antaŭ ĉio ni menciu la lernolibrojn. La hungara vario de *„Plena Gramatiko" de Kalocsay,* la „Rendszeres nyelvtan", aperis ankaŭ en dua eldono. La lernolibron de *Julio Baghy* oni eldonis jam en pli ol cent mil ekzempleroj. La du lerniloj de *Szerdahelyi: „Esperanto 1"* kaj *„Esperanto 2"* havis grandan sukceson — ĉe instruado en bazlernejoj. Ili estas akceptitaj de ILEI kiel internaciaj lernolibroj. Ĉi tie ni mencias, ke la lerte kunmetita *„Konversacia poŝlibro"* de *Mátéffy* kaj *Nagy* estas menciata inter la fontverkoj de la ĵus aperinta universitata lernolibro. Kaj ne vane, ĉar ĝi estas tre utila por ĉiuj lernantoj de Esperanto.

Al la lernolibroj apartenas la vortaroj, redaktitaj konscience de *Alfonz Pechan.* La *vortaroj Hungara-Esperanta,* la *Esperanta-Hungara* kaj la *Turista Vortaro* de Pechan estas aĉetataj de multaj miloj da komencantoj kaj progresantoj. La plej nova eldono estas *„La sporta lingvo en Esperanto" de Tibor Ujlaky-Nagy.* Ĝi estas bazo por kompilo de ĝenerale akceptota vortaro de la diversaj sportbranĉoj.

Antaŭ unu jaro aperis la 12-leciona, populara lernolibro *„Ni parolu Esperante", de L. Kökény,* kiu estas preferata en leteraj kursoj.

Ni grave progresis ankaŭ en la eldono de la belarta literaturo. Estas eldonitaj aŭ reeldonitaj: *„La tragedio de l'homo" de Madách,* tradukita de *Kalocsay.* — *„Dudek horoj"* romano de *Ferenc Sánta.* — La bestromano *„Vuk"* de *István Fekete,* en traduko de *Margit Leszkó.* — La porinfana bildolibro *„Ĉu ankaŭ vi scias?"* de *Eva Janikovszky,* tradukita de *Szathmári.* — *„Libero kaj amo"* poemaro de *Petöfi,* en majstra traduko de *Kalocsay.* — *„Sep reĝidoj"* de *Béla Balázs,* trad. de *Éva Farkas.* — *„Ora Duopo"* pri *Baghy* kaj *Kalocsay,* redaktita de *Kökény.* — Nun estas en

presejo la historia romano de *Gárdonyi: „La Sklavoj de Dio“*, trad. de *J. Hamvai.*

Estas tre popularaj la malpli dikaj libroj aŭ kajeroj kiel la *„Fabeloj“* de *Dorozsmai, trad. de Valeria Szabó*, du kajeroj de Benczik kun rakontoj kaj ŝercoj; *libreto pri la korespondado de Kaszap* kaj *Benczik.*

Multaj hungaraj verkoj estis eldonitaj ne en Hungario, sed eksterlande. Tio montras ankaŭ elstaran valoron de la hungaraj aŭtoroj. De *Julio Baghy* aperis en eksterlando post la dua mondmilito la verkoj *„Verda koro“. „Sonĝe sub pomarbo“, „Viktimoj“, „Sur sanga tero“ kaj „Aŭtuna foliaro“.*

De *Kalocsay* estis reeldonitaj la nemalhaveblaj stilistikaj-poetikaj verkoj: *„Lingvo Stilo Formo“*, la *„Parnasa Gvidlibro“*. — Kaj ĉu ne estas vera gloro por nia kulturo, ke en traduko de *Kalocsay* aperis en Esperanto tri dramoj de la brita giganto *Shakespeare?* En kunlaboro de *Kalocsay* kaj *Waringhien* aperis en granda volumo *elektita poemaro de Heine.*

Ankaŭ en eksterlando aperis la originala poemaro de *Tárkony „Soifo“* — veraj perloj de nia tuta poezio. Ankaŭ eksterlande eldoniĝis la altvaloraj verkoj de *Sándor Szathmári: „Vojaĝo al Kazoĥinio“* kaj *„Maŝinmondo“*. Ni ne forgesu ankaŭ pri nia frue mortinta *László Somlai,* kies tradukaĵojn el la hungara literaturo oni eldonis en aliaj landoj.

Fine ni alvenis al la librovendejo de HEA, preskaŭ unika en nia Esperantio, kie oni povas aĉeti multajn el la menciitaj libroj. (Kompreneble ankaŭ multajn aliajn aĵojn, insignojn, leterpaperojn ktp.) Fakte ĝi estas ne nur vendejo, sed ankaŭ informejo, ofte ankaŭ renkontejo por budapeŝtaj, eĉ eksterlandaj esperantistoj. Jes, ankaŭ tiu ĉi vendejo en la strato Kenyérmezö multe kontribuas al la kulturo de Esperanto.

*Johano Dévai*
*(El Hungara esperantisto 12/72)*

---

**Erweiterte Tagung des Zentralen Arbeitskreises Esperanto der DDR**

Am 1. und 2. Juni 1974 (Pfingsten) findet eine erweiterte Tagung des Zentralen Arbeitskreises der DDR in Berlin statt, zu der aktive Bundesfreunde aus allen Bezirken eingeladen werden sowie auch Gäste auf eigene Kosten teilnehmen können.

Da die Unterbringungskapazität beschränkt ist, ist für die Gäste eine schnelle Anmeldung über die Bezirksarbeitskreise erforderlich, die über entsprechende Kontingente verfügen.

Diese Beratung, die im Plenum und in fünf Arbeitsgruppen tagt, wird Bilanz zur bisherigen Tätigkeit der Esperantisten ziehen und über die weitere Arbeit beraten. An der Tagung nehmen Delegationen der sozialistischen Länder teil.

An zwei Abenden wird ein Kulturprogramm in Esperanto mit ausländischen Künstlern sowie neue Esperantofilme geboten. Die Teilnehmerkosten für Gäste (Verpflegung und Übernachtung) werden ca. 40,— bis 50,— M betragen.

Informationen geben der Zentrale Arbeitskreis Esperanto im Kulturbund der DDR und aller Bezirksarbeitskreise Esperanto.

**Internationale Buchhandlungen und Abteilungen des Volksbuchhandels, bei denen Esperanto-Literatur bestellt werden kann**

| Bezirk: | Anschrift: |
|---|---|
| *Rostock* | Internationale Buchhandlung „Die Bücherstube“<br>25 Rostock, Ernst-Thälmann-Platz 11<br>Universitätsbuchhandlung<br>22 Greifswald, Straße der Freundschaft 77<br>Goethe-Buchhandlung<br>23 Stralsund, Apollonienmarkt 5 |
| *Schwerin* | Volksbuchhandlung „das internationale Buch“<br>27 Schwerin, Straße der Nationalen Einheit 14 |
| *Neubrandenburg* | Volksbuchhandlung „Edwin Hoernle“<br>20 Neubrandenburg, Thälmannstraße 13–15 |
| *Potsdam* | Volksbuchhandlung „Das Internationale Buch“<br>15 Potsdam, Friedrich-Ebert-Straße 16<br>Volksbuchhandlung „Das Internationale Buch“<br>1701 Altes Lager Krs. Jüterbog, Treuenbrietzener Str. |
| *Frankfurt* | Volksbuchhandlung „Ulrich von Hutten“<br>12 Frankfurt/Oder, Platz der Republik<br>Gutenberg-Buchhandlung<br>13 Eberswalde, Eisenbahnstraße 70<br>Literatur- und Kunstkabinett<br>124 Fürstenwalde, Thälmannstraße 134 |
| *Cottbus* | „Jenny-Marx-Buchhandlung“<br>75 Cottbus, Stadtpromenade 7 |
| *Magdeburg* | Otto-von-Guericke-Buchhandlung<br>301 Magdeburg, Karl-Marx-Straße 30 a |
| *Halle* | Volksbuchhandlung „Das Internationale Buch“<br>40 Halle/Saale, Klement-Gottwald-Straße 13 |
| *Erfurt* | Volksbuchhandlung „Das Internationale Buch“<br>53 Weimar, Goetheplatz 9 a<br>Das Internationale Buch<br>50 Erfurt, Fischmarkt 8 |
| *Gera* | Volksbuchhandlung „das internationale buch“<br>69 Jena, Johannisstraße 17 |
| *Suhl* | Buchhandlung der Technischen Hochschule<br>63 Ilmenau, Weimarer Straße 17<br>Volksbuchhandlung Haus der Gewerkschaften<br>60 Suhl, Wilhelm-Pieck-Straße 8 |
| *Dresden* | Volksbuchhandlung „das internationale buch“<br>801 Dresden, Kreuzstraße 4 |
| *Leipzig* | Volksbuchhandlung „Das Internationale Buch“<br>701 Leipzig, Petersstraße 13<br>Volksbuchhandlung „Das Sowjetische Buch“<br>701 Leipzig, Petersstraße 13 |

| | |
|---|---|
| *Karl-Marx-Stadt* | Humboldt-Buchhandlung<br>901 Karl-Marx-Stadt, Bahnhofstraße 1<br>Akademische Buchhandlung<br>92 Freiberg, Merbachstraße |
| *Berlin* | Volksbuchhandlung „Das Sowjetische Buch“<br>108 Berlin, Unter den Linden 17<br>Das Internationale Buch<br>102 Berlin, Spandauer Straße 2 |

Jen la adresoj de la librovendejoj en la distriktaj ĉefurboj de GDR, kiuj peras esperanto-literaturon el eksterlando.

**En la menciitaj librovendejoj estas havebla jena valora esperanto-literaturo el Pollando:**

| | |
|---|---|
| *Grabowski:* | Nova antologio. Grabowski apartenas al la forĝintoj de esperanto-stilo. Li ĝis ekstremo fleksigis la lingvon kaj liveris al la esperantistaro la unuajn, apud Zamenhof, lingvajn modelojn. Prezo 3,25 markojn de GDR |
| *Brandys:* | Kiel esti amata. Novelo, laŭ kiu ankaŭ estis produktita filmo. Kortuŝa prezento de travivaĵoj de virino. Majstra traduko de Grum. Prezo 4,90 m |
| *Konopmicka:* | Mia poŝhorloĝo. La fumo. Du noveletoj. Prezo 4,90 |
| *Jablonska:* | La ebria muso. Ĉarma fabelo. Prezo 2,85 |
| *Reymont:* | La lasta. Rakonto. Prezo 2,05 m |
| *Tuwim:* | Poeziaĵoj. Tuwim apartenas al la plej ŝatataj en Pollando poemverkistoj, kiu ankaŭ originale verkis en Esperanto. Prezo 4,05 m |
| *Dobrzynski:* | Kantante tra Pollando. Kantaro tre bone uzebla en ĉiuj grupoj. Prezo 4,05 m |
| *Wojcikiewicz:* | El la vojaĝo tra Eŭropo. Ilustrita vojaĝalbumo. Prezo 4,05 m |
| *Wlodarczyk:* | Esperanto. Eldiroj de eminentaj polaj intelektuloj pri la internacia lingvo. Dulingva. Grava materialo. Prezo 6,50 m |

---

**„Soveta Armenio“**, broŝuro eldonita de la esperanto-komisiono de l'„Armena societo por Amikeco kaj Kulturaj Kontaktoj kun Eksteraj Landoj“. Jerevano, 1973, redaktis Gurgeno Sevak.

La kajero en kolora kovrilo estas riĉe ilustrita per fotobildoj. Ĝi informas densigite pri pasinteco kaj estanteco de tiu ĉi prosperanta respubliko soveta. Ĉio estas interesige rakontita, estas eseo pri grandioza evoluo de iam malriĉa limlando, kies gefiloj tradicie elmigris pro senespera mizero sub cara aŭtokratio. Sur 30 paĝoj estas pruvita la ekflorado dum kvin jardekoj de soveta potenco. Multaj ekzemploj faras ekkonebla la altnivelan prosperostaton sur ĉiuj terenoj de socia vivo kaj la ekonomiaj atingoj. Soveta Armenio estas konata kiel lando de suno, montaro, estingitaj vulkanoj kaj multkoloraj kontrastoj. Hodiaŭ ĝi estas hejmo de scienco, sporto, de ĉiuj branĉoj de arto kaj de moderna industrio. La broŝuro peras al la leganto multajn ekmirindajn faktojn kaj instigas lin konatiĝi tiun historie interesan landon, kies pejzaĝo etendas de dezerto ĝis eterna neĝo.

*Rudolf Haĥlbohm*

# Polaj eldonaĵoj en Esperanto

*(Komparu ankaŭ la oferton sur paĝo 34!)*

Inter la aĉeteblaj eldonaĵoj troviĝas du poem-kolektoj. Unu el ili estas *„Nova Antologio“* prilaborita de *Antoni Grabowski*, la patro de la Esperanto-poezio. „Nova Antologio“ enhavas tradukojn de dudek poemoj de i. a. Adam Mickiewicz, Juliusz Słowacki, J. W. Goethe, Narcyza Zmichowska. En ĉi tiu poemkolekto troviĝas ankaŭ fabloj de La Fontaine kaj fragmento de la dramo de Juliusz Słowacki „Mazepa“, kiun Grabowski tradukis speciale por la 8-a Universala Kongreso de Esperanto en la 1912 jaro en Krakovo. Ĝi estas vere rekomendinda poem-kolekto por ĉiuj ŝatantoj de la Esperanto-poezio.

Same rekomendinda estas la poem-kolekto de *Julian Tuwim* titolita *„Poezĭaĵoj“*. En ĉi tiu libro troviĝas kaj tradukoj el la poeziaĵoj de Tuwim faritaj de diversaj polaj esperantistoj kaj ankaŭ propraj tradukoj de Tuwim, kiu mem estis esperantisto kaj kies bonegaj tradukoj estas ĝis hodiaŭ modelo por la nuntempaj E-poetoj kaj tradukantoj de poeziaĵoj en Esperanton.

Julian Tuwim apartenas al la plej eminentaj poetoj kaj plej eminentaj tradukistoj en la tuta historio de la pola literaturo kaj ni kredas, ke per ĉi tiu libro oni povos, almenaŭ parte, konatiĝi kun liaj verkoj.

Parolante pri la poezio oni ne povas forgesi, ke en Pollando oni aperigis la *„Parnasan Gvidlibron“* de K. Kalocsay, G. Waringhien kaj R. Bernard. Tiu ĉi grava teoria verko pri la Esperanto-poezio, enhavanta ankaŭ la kompletan rimaron, estas ankoraŭ aĉetebla kaj ni forte rekomendas ĝin al ĉiuj, kiuj serioze volas okupiĝi pri la Esperanto-poezio.

Inter la prozaj esperantlingvaj eldonaĵoj aperigitaj en Pollando, kiuj estas aktuale aĉeteblaj pere de „Ars Polona“, menciindas la konata rakonto de *Kazimierz Brandys „Kiel esti amata“* en la traduko de Jerzy Grum. La temo estas travivaĵoj de aktorino, ĉefe el la periodo de la hitlera okupacio, retrospektive ŝpiniĝantaj dum ŝia aviadila vojaĝo al Parizo kelkajn jarojn post la milito. Pri tiu ĉi libro la fama Esperanto-poeto, akademiano William Auld interalie skribis: „Kiel la rakonto, tiel ankaŭ la traduko sidas firme en la dua duono de la 20-a jarcento. Ĝia lingvaĵo estas aktualeca: lakona, vigla, pitoreska, sed nepre laŭ la moroj de hodiaŭ. Esperanto en tiu ĉi verko mode vestas la pensojn de moderna virino, kaj tio ŝuldiĝas grandparte al Grum“.

Aktuale aĉetebla estas ankaŭ *„Mia poŝhorloĝo. La fumo“* — du noveloj de la konata pola klasika verkistino *Maria Konopnicka*. La unuan novelon *„Mia poŝhorloĝo“* tradukis la fama *Kazimierz Bein (Kabe)*, la duan *„La fumo“* tradukis same altnivele *Jerzy Grum*.

*„La lasta“* estas rakonto de *Władysław Reymont*, eminenta pola verkisto, Nobel-premiito, en la eminenta traduko de *Kazimierz Bein (Kabe)*. La traduko estas vere instrua kaj ĝi povas servi kiel modelo de bona Esperanto-stilo.

Inter la prozaj E-libroj, kiuj estas aktuale aĉeteblaj pere de „Ars Polona“, troviĝas ankaŭ raportaĵo kun fotoj de *Z. Wójcikiewicz, „El la vojaĝo tra*

**Vroclava vespero en Dresdeno**

Jam estas bona tradicio, ke ĉiu-jare dum oktobro okazas kulturaj tagoj de najbaraj ŝtatoj. Oni reciproke prezentas ensemblojn, aktorojn, ekspoziciojn, ktp.
Nia najbara distrikto estas Vroclavo/Pollando, kaj pro tio la kulturaj tagoj nomiĝas Vroclavaj kulturaj tagoj, kiuj okazis en la distrikto Dresden de la 9-a ĝis 13-a de oktobro 1973.
La Vroclavaj kulturaj tagoj havas specialan signifon, ĉar Vroclavo estas la ĝemela urbo de Dresdeno. Jam de kelkaj jaroj ekzistas ĝemelaj rilatoj inter niaj ambaŭ urboj kaj distriktoj. Ofte diversfakaj delegacioj vizitas nian urbon aŭ inverse.
Al la pliprofundigo de la rilatoj inter la du urboj kaj distrikoj kontribuas la senvizaj vojaĝeblecoj. Reciprokaj vizitoj pliprofundigas la scion por la alia popolo, ties kutimoj, moroj, historio, ktp.
Kelkfoje ni jam vizitis nian najbaran ŝtaton. Ĉiam ni trovis tie afablajn homojn kaj multajn amikojn.
Ĉi-jare dum II-aj Vroclavaj kulturaj tagoj la Dresdena Esperantogrupo en Kulturligo de GDR, ne nur volis partopreni la kulturajn tagojn de nia ĝemela urbo aŭ distriko, sed ankaŭ kontribui ion al tiu granda aranĝo. Ni preparis Vroclavan vesperon por 13. 10. 1973 en Dresdeno kaj invitis esperantistojn de la Vojevodia organizaĵo de PEA el Vroclavo partopreni nian aranĝon. Tial la vroclava vespero fariĝis bona sukceso.
La Vroclavaj esperantistoj ne nur gastis ĉe ni, sed ni komune montris al ĉiuj partoprenantoj kiel facile oni povas kunlabori rilate al la kultura programo.
En siaj salutparoladoj kaj prelegoj la ĉeestantoj sin reciproke informis pri la agado de la esperantistoj kaj la eblecoj de la interkultura uzo de Esperanto. Ili esprimis sian solidarecon al la ĉilia popolo. Post recito de la fama poemo de Heinrich Heine „La sileziaj teksistoj" de Dresdenano la pola poetino Mira Andrusiewicz recitis kelkajn poemojn memverkitajn. Per lumbildprelego pri Vroclavo kaj komuna kantado de la Internacio la oficiala parto de la vespero finiĝis.
Ĉeestis kelkaj neesperantistoj, kiuj esprimis sian surprizon pri tiu aranĝo. Ili kontaktis kun la gastoj kaj interamikiĝis. La gazetaro raportis. Ni vere devas konstati, ke niaj polaj amikoj tre bone preparis sin por tiu renkontiĝo. Ĝi daŭris 2 tagojn. Dum tiu tempo la gastoj el nia ĝemela

---

(resto de pĝ. 35)

*Eŭropo*". La aŭtoro priskribas sian vojaĝon tra pluraj eŭropaj landoj kaj partoprenon en E-aranĝoj, kiun li faris kune kun grupo de krakovaj esperantistoj.
Inter la lernolibroj de Esperanto, pri kiuj one ofte demandas kaj kiuj estas ankoraŭ aĉeteblaj troviĝas la pola disko-kurso „Ĉu vi parolas Esperante?" de *A. Pettyn*. Ĝi konsistas el lernolibro kaj 4 longludantaj diskoj, sur kiuj troviĝas esperantlingvaj dialogoj registritaj per la voĉoj de la plej bonaj parolistoj de la E-elsendoj de la Pola Radio. Tiu ĉi diskokurso estas uzata kiel akompana instruilo en 23 landoj. Alia eldonaĵo „*Esperanto laŭ amuzmetodo*" de la sama aŭtoro estas ankaŭ uzata en kelkaj landoj kiel kompletiga instru-materialo.

*(Pola Radio 12. 10. 1972)*

# POST LA KURSO

**Danĝera akvo**

Jim kaj Joe, du kontrabandistoj de brando (Branntweinschmuggler) el la kanada sovaĝejo (Wildnis) unuatoje en sia vivo veturis per vagonaro. Ili estis soifaj (durstig). Alkoholaj trinkaĵoj ne estis haveblaj, nur mineralakvo, — kaj tio estis fluaĵo (Flüssigkeit), kiun ili ja (zwar) konis laŭnome, sed ĝin trinki ... tion ili rifuzis ĝis nun kun abomeno (Abscheu). Sed nun ili ja ne povis ricevi ion alian. — Kiam trairis la kelnero de la restoracivagono (Speisewagen), ĉiu el ili grumble (brummend) aĉetis botelon. Jim malfermis la sian kaj prenis grandan gluton (Schluck). En la sama momento la vagonaro enveturis tunelon. „Nu, kiel ĝi gustas?“ (schmeckt) demandis lia amiko. Joe en la mallumo (Dunkel). „Pro Dio, ne trinku la fiaĵon (das „Zeug“), mi estas tute blinda!“

**Respondu per kompleta frazoj:** *1. De kie venis la du kontrabandistoj? 2. Kio ne estis havebla en la vagonaro? 3. Kion ili aĉetis? 4. Kio okazis en la momento, kiam Jim trinkis? 5. Kion demandis lia amiko? 6. Kiun respondon li ricevis?*

**La ruzaj hundoj**

Antaŭ multaj jaroj ĉina diplomato rakontis en la rondo de siaj amikoj jenan amuzan historion. Dum sia restado (Aufenthalt) en Ĉinujo li havis kvar hundojn. Iuvespere, kiam li venis hejmen post la deĵoro, li trovis ilin dormantaj sur lia kuŝejo (Lager). Kolera pro la malbona konduto, li forpelis (vertrieb) ilin kaj batis ilin per bastono. Kiam li venis hejmen en la dua vespero, la hundoj kuŝis sur la planko, do ne sur lia kuŝejo. Sed kiam li ŝovis (schob) sian manon en la liton, li trovis ĝin ankoraŭ tute varma de iliaj korpoj. Kaj li batis la hundojn denove. En la tria vespero li revenis ankoraŭ pli frue ol kutime (gewöhnlich), ĉar li volis funde (gründlich) esplori la aferon. Jen la hundoj sidis antaŭ lia kuŝejo kaj blovis (bliesen) sur ĝin por ĝin malvarmigi!

**Respondu:** *1. Kion posedis la diplomato? 2. Kie li trovis la hundojn en la unua vespero? 3. Kion li faris? 4. Kie kuŝis la hundoj en la dua vespero? 5. Sed kion konstatis la diplomato? 6. Kial li hejmeniris pli frue en la tria vespero? 7. Kion li vidis?*

*(El „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen)*

---

(resto de pĝ. 36)

urbo kaj nia ĝemela distrikto konatiĝis kun la urbo mem, kun ties admirindaj vidindaĵoj kaj kompreneble kun membroj de la Esperanto-grupo Dresdeno en Kulturligo de GDR.

La duan tagon ni vizitis la kastelon Pillnitz. Tiu kastelo iam apartenis al la grafino Kosel, la amatino de saksa princo Aŭgusto, la fortulo, kiu samtempe estis pola reĝo. Verŝajne estas konata la romano de la pola aŭtoro Józef Ignacy Kraszewski pri ŝi.

La esperantistoj de Dresdena-Esperanto-grupo en Kulturligo de GDR klopodis pri sama gastameco, kiun ili renkontis en Vroclavo.

Ni povas konstati, ke tiu renkontiĝo, al kiu invitis la Esperanto-grupo de la urbo Dresdeno, bone sukcesis. Ĝi plifortigis la kunlaboron inter la ĝemelaj urboj kaj ĉiuj trovis novajn amikojn kaj enlandajn kaj eksterlandajn.

Per tio ni ankoraŭfoje dankas al ĉiuj partoprenantoj el Malsupra Silezio por iliaj prezentaĵoj kaj same al la Kulturligo, kiu malavare subtenis materie. Ni jam ĝojas pri venontaj renkontiĝoj en Dresden aŭ ie ajn.

*(Laŭ Evelin Berndt, Dresden)*

## LA GAZETARO PRI NI

„*Kompaß*“, gazeto de ŝipfarejo Wismar, n-ro 37, 14. 9. 72. „Kiun signifon havas E-to?“ N-ro 38, 21. 9. 72 „Esperanto — pli ol hobio, sufiĉe ampleksaj artikoloj“

„*Werftstimme*“, gazeto de ŝipfarejo Neptunwerft, Rostock. 5. 10. kaj 12. 10. 72 pri novaj E-to-kursoj; 14. 12. 72 amplekse pri rilatoj al Sovetunio; 15. 1. 73 pri multaj respondoj el SU al tien senditaj salutoj okaze 50 jaroj de Soveta Unio.

22. 3. 73 kaj 29. 3. 73 ampleksa raporto de franca esperantisto pri la situacio de francaj laboristoj.

„*Norddeutsche Zeitung*“, Schwerin. 17. 10. 72 Informo pri E-to, tre ampleksa raporto.

„*Norddeutsche Neueste Nachrichten*“, Rostock. 28. 9. 72 amplekse pri nova kurso; 31. 10. 72 pri vizito de Rostockaj esperantistoj en Szcecin; 3. 1. 73 „Ĉu Esperanto en UdSSR aktualas?“ Jesa respondo per ekzemploj; 2. 10. 73 amplekse pri Esperanto.

„*Demokrat*“, Rostock, 2. 11. 72. E-amikoj renkontiĝis en Szczecin, amplekse pri vizito de E-istoj el Rostock en Szczecin/Pollando; 7. 11. 72 kursanonco. 2. 7. 73 amplekse pri esenco kaj celo de E-o.

„*Demokrat*“, Schwerin, 5. 1. 73 pri magazino „Junularo“; 16. 9. 73 pri nova kurso.

„*Ostseezeitung*“, Rostock, 4. 11. 72 ampleksa anonco de kurso.

„*Sächsische Zeitung*“ (SZ), Niesky, 4. 11. 72 pri trilanda renkontiĝo en Seifhennersdorf.

„*Sächsische Zeitung*“, Dresden, 4. 12. 72 Vespero de Dresden en Wroclaw, amplekse pri prelego de Dresdenanoj en la pola urbo; 10. 1. 73 pri broŝuro „Junularo“; 7. 2. 73 pri E-rapidkurso.

„*Sächsische Zeitung*“, Zittau, 24. 10. 72 tre ampleksa kun foto pri 3-landa renkontiĝo en Seifhennersdorf; 6. 12. kaj 15. 12. 72 pri salutoj el Sovetio; 28. 8. 73 amplekse pri kunlaboro kaj renkontigoj inter esperantistoj el Wroclaw kaj, Zittau; krome informoj 9. 9. 73 kaj 11. 9. 73, 12. 9. 73.

„*Sächsische Zeitung*“, Bautzen, 16. 6. 73 pri GDR-pola renkontiĝo en Bautzen. „*Nowa doba*“, sorba-lingva-gazeto, Bautzen, 27. 11. 72 amplekse pri la trilanda renkontiĝo (120 partoprenintoj) en Seifhennersdorf; 22. 6. 73 pri GDR-pola renkontiĝo en Zittau.

„*Volksstimme*“, Magdeburg, 6. 12. 73 pri distrikta renkontiĝo en Magdeburg; 24. 3. 73 pri „Junularo“-broŝuro; 16. 5. 73 pri Kopernik-prelego en E-to de Teresa Nemere en Potsdam.

„*Thüringer Neueste Nachrichten*“, Erfurt, 8. 12. 72 amplekse pri la kantistino Gerda Lapoehn; 13. 12. 72 „Ĉu E-to en USSR aktualas?“ Positiva jeso pri Jan Ojalos el Tallin; 6. 6. 73 marionetoj parolas E-ton, pri pupteatra festivalo en Zagreb.

„*Freie Welt*“, Berlin, ilustrita revuo, eldonkvanto 400 000, 50/72 4 paĝa intervjuo pri E-to kun Detlev Blanke; en n-ro 6/73 10 eltiroj el leteroj de legantoj.

„*Märkische Volksstimme*“, Potsdam, 2. 1. 73 „En ok lingvoj al la festivalo“ pri astronomia centro kie oni donas ankaŭ klarigojn en E-o.

„*Berliner Zeitung*“, Berlin, 3. 1. 73 „Broŝuro en E-o“ pri „Junularo“; 24. 1. 73 pri sondiska kurso pola de A. Pettyn.

„*Neues Deutschland*“, Berlin, 5. 1. 73 „Prezentoj en 8 lingvoj al la festivalo“, pri astronomia centro, kie oni donas ankaŭ klarigojn en E-o; 3. 8. 73 Sub Rubriko „Renkontiĝoj (Begegnungen) „En E-o interkompreniĝis jaŭde 44 festivalgastoj pri aktualaj problemoj de sia batalo por daŭra

paco eŭropa sekureco. La Renkontiĝon de Junaj Esperantistoj partoprenis delegitoj el 10 landoj.
„*Bauernecho*“, Berlin, 6. 1. 73 pri „Junularo; 24. 1. 73 pri sondiska kurso pola de A. Pettyn.
„*Das Volk*“, Erfurt, 9. 1. 73 pri nova kurso.
„*Neuer Tag*“, Frankfurt/Oder, 13. 1. 73. Sen tradukistoj en Leningrad, amplekse pri la amikecvojaĝo esperantiste 1972 el GDR al Leningrad; 6. 1. 73 pri nova kurso.
„*Thüringische Landeszeitung*“, Weimar, 10. 1. 73 pri la broŝuro „Junularo 20. 7. 73 tre ampleksa artikolo „Literaturlingvo Esperanto“; 22. 6. 73 „La espero de Zamenhof“, tre ampleksa artikolo, ŝajne ne de GDR-aŭtoro, ĉar mankas ĉiu indiko pri GDR-movado.
„*Der Morgen*“, Berlin, 13. 1. 73: „Ankaŭ Faŭsto de Goethe en E-o“ de Detlev Blanke, amplekse pri la problemo de esprimkapablo de E-o; 18. 2. 1973 pri E-o en sovetaj lernejoj; La serio de Peter Levsen daŭris aperi ĉiun duan dimanĉon i. a. pri jenaj temoj: kritiko de Interlingua (Gode), TEJO en Moskvo, monda junulara festivalo, Heinrich Heine en Esperanto, Sandor Petöfi, politikaj nocioj en E-o, interlingvistiko en Jena, la komunista manifesto, proletaro kaj E-o, laboristaj esperantistoj en Germanio, multaj aktualaj informoj, lingvaj ekzercoj k. t. p., 5. 8. 73 pri kuracisto D-ro Mönnich, partoprenanto de la X-a.
„*Der Morgen*“, Frankfurt/Oder, 20. 2. 73 pri E-movado en Frankfurt/O. 10. 6. 73 amplekse pri GDR-pola esperantista renkontiĝo prepare al la X-a Festivalo.
„*Sonntag*“, *Berlin*, 7. 1. 73 pri broŝuro „Junularo“.
„*Tribüne*“, Berlin, 23. 1. 73 pri broŝuro „Junularo“.
„*Gummiwerker*“, Waltershausen, 29. 1. 73 pri leteroj al Soveta Unio; 20. 2. 73 pri junulara E-laboro.
„*Sozialistische Universität*“, universitato Jena, 29. 3. 73 ampleksa raporto pri interlingvistika kolokvo.
„*Das Volk*“, Gotha, 18. 3. 73 pri pola muzikensemblo „suninfanoj“; 9. 5. 73 pri salutoj de E-istoj el Soveta Unio.
„*Das Volk*, Mühlhausen, 12. 5. 73 pri varbvespero.
„*Das Volk*“, Erfurt, 20. 2. 73 „E-o en kruca demandado“ amplekse pri varbvesperoj pri E-o en Ohrdruf.
„*Lausitzer Rundschau*“, Cottbus, 31. 1. 73 pri sondiska kurso pola de A. Pettyn.
„*Volkswacht*“, Gera, 21. 2. 73, iom amplekse pri „Junularo“-broŝuro, same 29. 3. 73; 20. 7. 73 pri renkontiĝo esperantista en Ostrov/ČSSR.
„*Neue Berliner Illustrierte*“ (NBI), Berlin, eldonkvanto ĉ. 1 miliono, n-ro 11/1973 iom amplekse pri E-o kaj kun foto pri „Junularo“-broŝuro; en n-ro 37/73 dupaĝa artikolaro de Rudi Graetz kun ilustraĵoj.
„*Brandenburgische Neueste Nachrichten*“, Potsdam, 4. 3. 73 „E-o tra Sanssouci“, amplekse pri E-o en Potsdam.
„*Leipziger Volkszeitung*“, Leipzig, 9. 6. 73 pri Apitz-romano en E-o; 22. 9. 73 pri 20jaroj MEM.
„*Lausitzer Rundschau*“, Hoyerswerda, 15. 6. 73 pri renkontiĝo kun polaj E-istoj; 28. 9. 73 amplekse pri Esperanto.
„*Mitteldeutsche Neueste Nachrichten*“, Leipzig, 13. 6. 73 pri renkontiĝo kun polaj amikoj. Ek de 19. 9. 73 ĉiun duan semajnon Esperanto-kurso; 19. 9. 73 pri 20 jaroj MEM.
„*Sächsisches Tageblatt*“, Dresden, 6. 7. 73, tre ampleksa artikolo „Esperanto akcelas internaciajn kontaktojn“, kun foto de Zamenhof-busto en Bialystok. Artikolo ŝajne ne de GDR-aŭtoro (nesignita). 1. 9. 73 kaj ĉiun

**Nova renkontiĝo kun ĉeĥaj fervojistoj!**

Kolego Hans Diedrich raportis en numero 57/58 de „der esperantist“ pri la jarkunveno de la Fervojista Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio dum novembro 1972 en Česka Trebova. La konferenco de la jaro 1973 nun okazis en Plzen. Kolego Rönicke el Halle kaj mi estis sekvintaj al la afablaj invitiloj de la ĉeĥaj geamikoj.
Ni loĝis kaj kunsidis en la centro de la malnova urbo-kvartalo Plzen. Pri la agrabla persona kaj oficiala akcepto ni memoros ĉiam kun plezuro. Kiel la aliaj eksterlandaj gastoj el diversaj landoj ankaŭ ni respondis al la akcepto per mallonga salutparolado. Poste ni aŭskultis la oficialajn raportojn de la estraranoj kaj la diskutadon kaj konatiĝis kun la problemoj de la ĉeĥaj fervojistaj esperantistoj.
Kun granda intereso ni sekvis la raportojn kaj la diskuton, precipe ankaŭ la diskutkontribuon de la I. F. E. F.-prezidanto sinjoro Gießner, pri la pliampleksigo kaj flego de la fakvortaro. Ke tiu laboro plu funkciadu malgraŭ diversaj malfacilaĵoj, estas laŭ mia opinió vivnecesa por Esperanto, ĉar nur tiamaniere Esperanto estos uzebla kiel internacia faklingvo, eble eĉ por la uzo per tradukadaj aŭtomatoj. Intereso ja ekzistas ankaŭ ĉe faktradukistoj (1).
Amuza flanko de la kunveno ne mankis. Plzen estas urbo de la biero. Ni ne nur vizitis biermuzeon, sed ankaŭ praktike kaj sufiĉe provis la bieron mem. Dimanĉe ni ekskursis al Kozel, al somera kastelo en la klasika stilo. La bela aŭtuna cirkaŭaĵo stimulis la gajan konversacion dum la agrabla migrado. Ankoraŭ pli gaje la adiaŭa vespero okazis. Eble fervojistoj inter la legantoj prenos mian raporton kiel motivon partopreni la sekvontan esperantan kongreson de la ĉeĥaj fervojistoj.

1) Hertzsch. Fremdsprachen – keine Barrieren des Informationsaustausches, Eisenbahnpraxis 7/1967 S. 237/239, Transpress-Verlag.

*Georg Kulecki*

---

(resto de pĝ. 39)

duan semajnon Esperanto-kurso; 5. 10. 73 20jaroj MEM; 19. 10. 73 pri esperantistoj el Wroclaw en Dresden, amplekse.
„*FF dabei*“, Berlin, 32, Televida kaj radio-gazeto, pĝ. 3 pri Esperanto kaj elsendoj en Radio Varsovio. Tiu revuo eldoniĝas en multe pli ol 1 miliono la ekzempleroj.
„*Der Schmiedewerker*“, Roßwein, Nr. 13/14 (julio 1973) Salutleteroj el Soveta Unio.
„*BZ am Abend*“, Berlin, 13. 8. 1973 pri kurso en Pankow.
„*Sächsische Zeitung*“, Löbau, 31. 8. 73 pri nova E-o- grupo en Zgorcelec/Pollando.
„*Freie Erde*“, Neubrandenburg, 18. 10. 73, amplekse pri E-to.
„*Der Neue Weg*“, Halle, 19. 10. 73 pri nova kurso.
Ĉiu distrikto mem povas tiri konkludojn pri la kvalito de sia gazetara laboro laŭ la aperigitaj artikoloj. Entute ni kolektis 91 artikolojn (ne menciante la seriojn en „Der Morgen“, „Sächsisches Tageblatt“, „Mitteldeutsche Neueste Nachrichten“).
Do en la periode de ĉirkaŭ unu jaro en GDR aperis minimume pli malpli ol 100 artikoloj, inter kiuj multaj sufiĉe ampleksaj. Krome 1973 grandaj ĵurnaloj riceveblaj en GDR presis longajn artikolojn (NBI, Sowjetfrau, Urania). Ĉirkaŭ la duono de la publicitaj artikoloj havas konkretan ligon al internaciaj renkontiĝoj, al iu grava publicaĵo. Do oni prefere ne nur sendu artikolojn ĝenerale pri Esperanto sed nepre ĉiam ligu la temon al konkreta grava kaj interesa politika (internacia) problemo.

# FILATELO

**Fondi filatelan komisionon?**

Estas proponite, fondi specialan fakkomisionon ĉe Centra Laborrondo, kiu okupiĝu pri filatelaj problemoj.

La **celo** de tiu komisiono estos:

1. kolekti ĉiujn esperantistojn-filatelistojn, kiuj uzas esperanton por siaj internaciaj filatelaj kolektoj,
2. helpi al ili ligi kontaktojn al la filatelaj respektive esperantaj grupoj je la diversaj labor- kaj gvidebenoj,
3. gvidi la esperantistojn-filatelistojn en sia laboro laŭ la direktivoj de Centra Laborrondo kaj la Filatelista Asocio en Kulturligo de GDR.

Estas i. a. planite, entrepreni jenajn **aktivecojn:**

a) publici konvenan materialon en „der esperantist", „Sammlerexpreß" kaj en aliaj gazetoj,
b) eldoni eventuale multobligitan informilon por esperantistoj-filatelistoj en Kulturligo de GDR,
c) Komune realigi diversajn aranĝojn inter filatelistoj kaj esperantistoj, organizitaj en KL (grupkunvenoj, ekspozicioj k. t. p.)
d) ligi amikajn kontaktojn al filatelistoj-esprantistoj el la eksterlando, speciale el la socialismaj landoj.

La **gvidado** de la laboro estu farita de komisiono, konsistanta el ĉirkaŭ 6—8 personoj, kiu aŭ laboru kiel elemento de la centra estraro de Filatelista Asocio en KL aŭ kiel fakgrupo ĉe CLR.

Ĉiuj filatelistoj-esperantistoj estas alvokitaj sin anonci ĉe Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, 108 Berlin, Charlottenstr. 60, kaj fari eventualajn sugestojn, proponojn aŭ aliajn rimarkojn pri la projekto.

**Libro 9-lingva**

Ĉe la ŝtata entrepreno pri filatelo „Pofis" (ĈSSR) aperis la 2a eldono de libro, kies ĉeĥa titolo signifas „Fremdlingva korespondado por filatelistoj" kaj kiu enhavas filatelan fakvortaron en 9 lingvoj, inkluzive Esperanton.

**Plej valora poŝtmarko**

La plej valora jugoslavia poŝtmarko de la postmilita periodo estas la 100-dinara Esperanto-poŝtmarko, eldonita en 1953 okaze de la Universala Kongreso en Zagreb. La nuna prezo laŭ la ĉijara eldono de la usona katalogo „Scot" estas 150 dolaroj.

*(El informilo de IEMW n-ro 2 (90) Majo 1973)*

---

**Skribas niaj legantoj:**

„... en nia distrikta gazeto aperis traduko el la internacia lingvo („La drinkejo de l'mutulo", novelaro de Ngyuyen Sang el Vjetnamio) ...
Niaj rondetanoj tre vaste korespondadas kun eksterlando kaj havas ligon i. a. kun Pola Radio kaj kun nia ĉefa helpanto Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR. ...
Nia rondeto diras grandegan dankon al CLR pro ĝia nememprofita helpo per Esperanto-materialoj k. s. ... "
Paulo Egorov, Moletai, Litovio Soveta Unio

## Reprezentantoj de PEA en Berlin

De 7-a ĝis 10-a de oktobro 1973 oficiala delegitaro de la ĉefestraro de Pola Esperanto Asocio estis gasto de Centra Laborrondo en Kulturligo de GDR. Al la delegitaro apartenis Stanislaw Swistak, prezidanto de PEA, Andrzej Pettyn, ĝenerala sekretario kaj Boleslaw Staszcak, membro de la prezidumo de PEA. La polaj kamaradoj fruktodone intertraktis kun siaj kolegoj el GDR pri subskribota en 1974 kontrakto pri kunlaboro. La gastoj vizitis ankaŭ Dresden kaj Potsdam. En Dresden la delegitaro de la ĉefestraro havis amikan renkontiĝon kun reprezentantoj de la Distrikta kaj Subdistrikta Laborrondoj.

## Praktika artifiko

Por raciigi kaj bildigi la instruon de la vortkunmetado kaj de la gramatiko de Esperanto bone uzeblas manfaritaj kartonkartetoj enhavantaj radikojn, gramatikajn finaĵojn kaj afiksojn.

Tiuj kartonkartetoj estas bone uzeblaj por magnet-tabuloj aŭ povas esti fiksataj sur iuspeca tenkondukilo. (ekzemple liniilo kun du ŝnuroj) Havante kartetojn kun jenaj elementoj *mi/skrib/as/is/os/al/vi/ŝi/li/ili/leter/o/n* oni ekzemple facile povas demonstri a) la aktivan simplan konjugacion (mi skribas/is/os) por prezenco, paseo kaj futuro b) la rolon de akuzativo kaj dativo kaj, ligita al tio, problemojn de la vortordo.

(laŭ ideo de Peter Liebig)

---

## La Prezidanto de Kulturligo de GDR profesoro d-ro Max Burghardt — 80 jara

*La 27-an de novembro 1973 la prezidanto de la Kulturligo de GDR, la fame konata artisto, verkisto kaj kulturpolitika aganto, profesoro Max Burghardt, fariĝis 80-jara. La esperantistoj de GDR aliĝas al la varmaj gratuloj venantaj el ĉiuj tavoloj de la popolo de GDR kaj de ĉiuj organizaĵoj. Ili deziras al la laŭ koro juna jubileulo multe da sano, feliĉo kaj ankoraŭ multajn jarojn de fruktodona agado por sozialisma kulturpolitiko en GDR.*

---

## Erich Ehmig — 65 jara

La 13. 8. 1973 la malnova laborista esperantisto Erich Ehmig el Hildburghausen fariĝis 65 jara. K-do Erich Ehmig, kiu ankaŭ jubileas sian 40jaran esperantistecon aktive kunlaboras en DLR Suhl. Ni deziras al la jubileulo ankoraŭ multajn fruktodonajn jaron de aktivado por kaj per la internacia lingvo.

## Erich Würker — 70 jara

La konata aktiva esperantisto Erich Würker, prezidanto de Distrikta Laborrondo Esperanto Karl-Marx-Stadt kaj membro de Centra Laborrondo, la 26-an de decembro 1973 festis sian 70-an vivojubileon.

Se la distrikto Karl-Marx-Stadt distingiĝas per multaj tre laŭdindaj aktivecoj rilate Esperanton, tio ankaŭ estas merito de la jubileulo. Ni deziras al nia amiko Erich Würker ankoraŭ multajn jarojn de same aktiva kunlaboro, sanon kaj ĝojon.

CLR

**„Juna amiko“ 1/1973**

Post la sukcese akceptita provnumero (kp. „d. e.“ 57/58, pĝ. 33) de la nova internacia lernejana esperanta revuo el Hungario (kiu same plaĉis, cetere, al multaj plenkreskuloj) nun aperis la unua „oficiala“ enseria numero septembro 1973/1-a jaro, n-ro 1 (oni kalkulas la abonon laŭ la lerno-jaro). Aperos ankoraŭ 2 pluaj numeroj (januaro kaj aprilo 1974). Se ĝi estos same varme akceptata kiel la ĝis nun aperintaj provnumero kaj la ĉi-menciita, tiam tiu valorega revueto ek de septembro 1974 aperados regule. La grafika aranĝo de la 25 paĝa revueto estas tre varia. En la kajero ni trovas i. a. artikolojn pri la X-a Monda Festivalo de la Junularo kaj Studentoj, pri Jugoslavio, enestas, krucenigmoj, ludoj, anekdotoj, ŝercoj, artikoloj pri mezurunuoj, pri Eiffelturo, kanto laŭ poemo de Petöfi kaj multaj desegnaĵoj kaj fotoj. Do ĝuste tio, kion bezonas ĉiu kursano kiel kroman aŭ dumkursan legaĵon. La kajero 1/73 jam estas liverita al la abonintoj. Sed interesiĝantoj, kiuj ankoraŭ ne mendis ĝin sed havas intereson ĝin daŭre ricevi, sin direktu al CLR. Ĉiu kajero kostas 1.20 GDR-m. D. B.

# INFORMOJ

**Geologia verko**

Geologio Internacia — Kolekto de originalverkoj en Esperanto. Volumo 2, pĝ. 144, 30, 5×14,5 cm, eld. 1972 Geoindustria n. p. en Praha, respondeca gvidanto: RNDr. Kiri Šindelár, CSc, ĉefa red. Josef K a v k a (Dr., CSc), teknika redakcio: Geologia Sekcio de ISAE. Eldonita okaze de la 24-a sesio de la Internacia Geologia kongreso en Montrealo 1972. La 1-a volumo aperis okaze de la 23-a IGK en Praha, 1968). Ĉar la klopodoj, celantaj enkonduki Esperanton kiel oficialan lingvon de la geologoj ne povis esti plene disvolvitaj pro l' antaŭtempa finiĝo de la 23-a sesio, en Montrealo denove okazos seriozaj intervenoj plede por E.

Kion diru laiko pri tiu ĉi respektinda faka verko, ilustrita kaj plaĉe ekipita? Oni devas sincere admiri la laboron de tiuj, kiuj pretigis ĝin. Jen modelo de perfekta apliko de la Internacia lingvo sur kampo scienca. Traktatoj de aŭtoroj el Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, GDR, Brazilo, Kanado, Hungario kaj nacilingvaj resumoj (i. a. en portugala, hungara). Unu ekzemplo: „Demetiĝa medio de la paleoĝis mezozoikaj sedimentoj en la baseno Piaui-Maranhao“ (Brazilo). —

Aldonita estas latinlingva listo „Elementa grammatica linguae Esperanto“ (Cailleux kaj Pumpr).

Ricevebla ĉe ĉeĥa Esperanto Asocio po 24 Kĉs plus afranko.

(El „Starto“ 6/72, Praha)

# INFORMOJ

**Gramatiko de Hermann Göh!**

Aperis ĉe Centra Laborrondo fotorepreso de la 300-paĝa germanlingva gramatiko de Esperanto de profesoro Hermann Göhl. La gramatiko estas fidinda konsultanto same por komencantoj kiel ankaŭ por progresintoj kaj kursgvidantoj. Detala indekso ebligas tuj trovi ion difinitan problemon, kiu estas detale klarigita kun multaj ekzemploj, parte Zamenhofaj. La libro kostas M 6,00 kaj estas ricevebla nur ĉe CLR. La distriktaj kaj subdistriktaj rondoj prefere faru kolektivajn mendojn.

**Mendoj por „Nuda inter lupoj"**

Mendojn por la Esperanto-eldono de „Nuda inter lupoj" akceptas la internaciaj librovendejoj (komp. paĝon 33). Sed ankaŭ la eldonejo mem, Edition Leipzig, 701 Leipzig, PSF 340.
Estus bone, se la grupoj respektive distriktaj kaj subdistriktaj laborrondoj mendus la libron kolektive. La libro kostos 12 markojn kaj aperos en februaro 1974. Ĝi estas oficiale indikita en la GDR-libro-katalogo „Nova" n-ro 16/1973 kaj por sovetaj esperantistoj oficiale mendebla ĉe

*„Knigeksport", Moskvo A 183,*
*4-yi Nowomichailkowskij*
*prozed dom n-ro 11.*

La landaj esperanto-asocioj de socialismaj landoj ricevos informojn pri akireblecoj ĉe la landaj asocioj. En dubaj kazoj ĉiu eksterlanda esperantisto mendu la libron rekte ĉe la eldonejo (la adreson vidu supre).

**Abono por „Paco" 1974**

En n-ro 59/60 „der esperantist", sur paĝo 42 erare estis indikita la prezo por „Paco" 1974 per 8 markoj. Tutjara abono kostas **6** markojn.

**Dua kajero „Ni kantas esperante"**

Sub la redakto de Harald Michael kaj Ludwig Schödl aperis la dua kajero de la kantara serio „Ni kantas esperante". Ĝi enhavas sur 24 paĝoj riĉan kolekton de diverstemaj kantoj. Enestas folkloraj kantoj, amkantoj, batalkantoj kaj kanzonoj. Kun notoj.
La libro kostas 1.30 kaj haveblas ĉe CLR. La unua kajero de „Ni kantas esperante" jam aperis en la tria eldono kaj same haveblas ĉe CLR.

**„Der Morgen"**

Eble kelkaj legantoj de la esperanto-artikolaro de Peter Levsen miras ne plu trovante la kontribuojn en la dimanĉaj eldonoj. La artikoloj ek de septembro aperadas ĉiun duan **sabaton.** La lastaj artikoloj estis i. a. *Turisma konversacio I* (306, dimanĉe, 23. 9. 1973) *Turisma konversacio II* (307, dimanĉe, 7. 10. 1973), *Esperanto, lingvo de scienco I* (308, *unuafoje sabate,* 27. 10. 1973), *Esperanto, lingvo de scienco II* (309, sabate 10. 11. 1973). *Retrorigardo al 20 jaroj MEM* (310, 24. 11. 1973) k. t. p.

**Eszperantó-Magazin**

Kun eldonkvanto de 10 000 ekzempleroj aperis la unua hungarlingva revuo „Esperanto-Mágazin", kiu estas aĉetebla en ĉiuj ĵurnalkioskoj de la lando. La revuo, bele kaj moderne presita, celas informi pri la monda lingva problemo kaj ties solveblo per Esperanto.

**Pola Esperantisto 1/2 1973**

amplekse raportis pri la aperonta en GDR, romano „Nuda inter lupoj" de Bruno Apitz. Estis publicitaj kelkaj fragmentoj kun fotoj el la samtitola filmo.

**El Frankfurt/Oder**

En n-ro 59/60 „der esperantist“, pĝ. 40 ni raportis pri renkontiĝo inter polaj kaj GDR-esperantistoj en Frankfurt/Oder. Jen parto de la partoprenintoj

Blanke skizis la trajtojn de la internacia esperantomovado ilustrante per lumbildoj kaj sonbendoj.

**Leipzig**

Am 7. Oktober 1973 fand in Borna ein Treffen von Esperantisten aus dem Bezirk Leipzig statt, an dem 16 Personen teilnahmen. Aus dem Mund des bekannten Bornaer Puppenspielers Frannek erfuhren wir viel Wissenswertes über die Entstehung und die geschichtliche Entwicklung der Kreisstadt Borna. Während der Führung durch die Stadt konnten wir deren Sehenswürdigkeiten, vor allem interessante und historisch wertvolle architektonische Bauten besichtigen.

Einen guten Abschluß dieses Tages bildete ein musikalischer Ohrenschmaus, indem uns der Phonoklub Borna per Schallplatte durch das 20. Jahrhundert führte.

Alle Teilnehmer schätzten dieses Treffen als guten Erfolg ein.

Regina Boas, Leipzig

Raporto pri esperantista renkontiĝo en Borna ĉe Leipzig.

**Starto en Cottbus**

Ek de la 3-a novembro ankaŭ en distrikto Cottbus ekzistas Distrikta Laborrondo Esperanto sub la gvido de Peter Liebig. La fondokunvenon partoprenis 50 personoj, inter ili multaj junuloj. Rudi Graetz donis skizon pri la celoj, stato kaj perspektivoj de la esperantolaboro en Kulturligo de GDR. Detlev

**Filmo pri Esperanto en pola televido**

La 28-an de oktobro 1973, 16.45 Uhr la unua programo de la pola televido dissendis la 40-minutan televidan filmon pri Esperanto. La pollingva filmo (ankaŭ kun esperantlingvaj partetoj) estas tradukata esperanten kaj 1974 ankaŭ montreble en aliaj landoj.

**Reĝustigo**

En „der esperantist“ n-ro 59/60, pĝ. 2 erare estas skribite, ke la menciita kulturgrupo agis en Suhl. Korekte: Ĝi prezentis sian programon en Tabarz antaŭ 120 gastoj.

La red.

Mortis la 31. 10. 1973 en Magdeburg la laborista esperantisto

**Franz Tischer**

La forpasinto apartenas al la nelacigeblaj esperantistoj, kiuj varbis multajn amikojn por la internacia lingvo.

Ĉiu lin koninta konservos al Franz Tischer honoran memoron.

## Preseraroj / Druckfehler, „der esperantist“ 59/60

*Bedaŭrinde enŝteliĝis jenaj preseraroj en la studon de prof. Falkenhahn, pro kiuj ni pardonpetas.*

*Leider haben sich folgende Druckfehler in die Studie von Prof. Falkenhahn eingeschlichen, für die wir um Entschuldigung bitten.*

| | | erare/falsch | korekte/richtig |
|---|---|---|---|
| paĝo / Seite 11 | 10-a linio de malsupre (10. Zeile von unten) | я говоримь | я говоришь |
| | 4-a linio de malsupre (4. Zeile von unten) | я говориьм | я говоришь |
| Seite 14 | 18-a linio de supre (18. Zeile von oben) | Einklanges | Eigenklanges |
| Seite 14 | 3-a linio de malsupre (3. Zeile von unten) | bildet | bietet |
| Seite 22 | 12-a linio de supre | du wärst | du warst |
| Seite 23 | 8-a linio de supre | violini | violoni |
| Seite 25 | 21-a linio de supre | Lehrüber- | Lehnüber- |
| Seite 28 | 21-a linio de malsupre | t. o. | t. e. |
| Seite 28 | 12-a linio de malsupre | stuo | studo |
| Seite 20 | supre, dekstre (von oben, rechts) | | |
| | erare/falsch | | korekte/richtig |
| | **Gen. Pl.** | | |
| | der hoh-en<br>hoh-er } Häuser | | der hoh-en<br>hoh-**er** } Häuser 88, 89 |

Krome prof. Falkenhahn atentigas la resuminton (k. pĝ. 28), ke la estona lingvo, kiun li konas sed ne reprezentas kiel studfakon ne apartenas al la „baltaj lingvoj“ (preferinde ol „baltikaj“), sed al la finno-ugraj lingvoj. Anstataŭ „Baltika Societo ...“ preferindas „Baltista Societo de GDR“.

La red.

---

*El Taŝkento skribas E. S. Perevertajlo, estrarano de la tiea junulara klubo (Taŝkento — P. 700 000, Abon. Kesto 140)*

Laŭ mia sugesto kelkaj gek-doj sendis korespondanoncojn al la revuoj kaj gazetoj, liston de kiuj vi sendis al ni. Mi konservos ĝin kaj ĉiam rekomendos sendadi tien la korespondanoncojn. Tio donas sian utilon, ĉar unue, la redakcioj aŭdos de tutmonda esp-istaro, due, esp-istaro havos eblecon koresponde amikiĝi kun GDR-anoj.

Nia urbo estas sufiĉe malproksima de via lando, tamen iam venas al ni viaj esp-toj. Ni havas peton, se iu intencas veni al nia urbo kaj respubliko, ni devas esti avertataj antaŭtempe por aranĝi normalan akcepton. Tiuj GDR-anoj, kiuj estis akceptitaj de niaj klubanoj, mi esperas, longe ne forgesos nian gastamon. Ni deziras, ke la renkontiĝoj estu kiel eble pli oftaj ...

# KORESPONDDEZIROJ

## Bulgario

Lernantoj de la lernejo „Otec Paisij“ (ŝkola) dez. koresp. per b. k. kolektive aŭ individue. Skola „Otec Paisij“, **Vidin.**

15 jara lernanto, bulgara junulo, lernanta la germanan lingvon, dez. koresp. kun germana lernanto kaj reciprokan gastadon. D-ro Valentin Kasalov, **Burgas,** str. Republikanska No 131, vh D.

## ĈSSR

Volonte pliriĉigas sian repertuaron KVARTETO ESPERANTO kaj petas ĉiujn posedantojn de bonaj tradukoj de germanaj popolkantoj kaj populariĝintaj kantoj pri ties afabla laŭeble plej baldaŭa alsendo-se eble kune kun la notoj (sufiĉas la melodio). Viajn sendaĵojn direktu al la afergvidanto de la ensemblo s-ro E. V. Tvarozek, Hodzova 1939/6, **911 01 Trenĉin 1.**

Teknologo, 47 jara dez. koresp. pri ĉ. t. Miloŝ Pliĉk, Erbenova 725/60 **29301 Mladá Boleslav.**

## GDR

Dez. koresp. tutmonde, 29 jara, Wolfgang Rohde, **DDR 8312 Heidenau,** Beethovenstr. 56.

## Grandbritio

Dez. korespondi tutmonde, speciale kun Sovetunio, ĈSSR, Bulgario, Finnlando, 56 jara sinjorino, Louise Morris, 55 Alfred Street, **Southampton,** SO 2 OHB, Hants.

Instruisto de ĥemio, 26 jara, dez. korespondi kun GDR-anoj pri politiko, sindikatoj, kulturo, muziko. Rob. Wolverson, 20 Caudwell Close, **Grove,** Wantage, Berkshire.

## Hungario

Dez. koresp. 17 jara knabino. Katalin Holicskas, **2851 Környe** Rákóźi u. 51.

Mezlernejano, 18 jara dez. koresp. kun fraŭlinoj el GDR, Arva László, **8360 Keszthely** (Balatono) Matyás kir. u. 58.

## Rumanio

Dez. koresp. Vanc Teofil, **Oradea 10,** str. Triumfului nr. 26.

## Kubo

Komencanto, filatelisto, en la angla, franca, Esperanto. Orlando Sanz Menendez, Correa 210 entre Floresy Gerrano, Santos Guarez, **La Habana.**

## Svedio

Socia konsilantino serĉas sovetan amikon ĉirkaŭ 30—45 jaran. Interesiĝas i. a. pri literaturo, lingvoj, vojaĝoj naturo, homoj kaj sociaj problemoj. Soile Amelin, Tengdahlsgatan 21—6, **11641 Stockholm.**

## Hispanio

Dez. koresp. kolektanto de esperantaĵoj, 27 jara. Jesuo Perez Calallero, str. Dtor Navarco Touent 8 **Las Palmas,** Canarian (Espana).

## Pollando

Ekonomiisto, 26 jara dez. koresp. kun la tuta mondo. Mieczyslaw Porowski, **45-774 Opole,** ul. Dambonia nr. 133/15. Dez. koresp. Grzegorz Scheffler, **Zgorzelec,** str. Szymanowskiego 29 — mgr. Wladyslaw Bilyk, **Zgorzelec,** str. Boh. Getta 15/3 — Wlodzimierz Malinowski, **Zgorzelec,** str. Tuwima 28/6 — Pri poŝtmarkoj, Stanislaw Przybylak, **97—300 Piotrow Tryb.** ul. Wyzwolenia bl. 33.

Kursanoj ĉe la kulturdomo en Kolbudy (Gdansk) dez. koresp. Klubo „Esperanto“, **83—050 Kolbudy,** GOK str. Starmlynska 1.

Grazyna Paruzel, ul. Rynek 10. **42—600 Tarnowskie Góry,** woj. Katowice. Aĝo: 20 jaroj. Interesoj: poezio, teatro, turismo, muziko.

Mieczyslawa Krzak, ul. Korczaka 5/13 **42—600 Tarnowskie Góry.**

Aĝo: 20 jaroj. Interesoj: Muziko, turismo, filmo.

# KORESPONDDEZIROJ

## Soveta Unio

Grupo de 12—14 jaraj geknaboj dez. koresp. tutmonde. Esperantogrupp, Kesekool. **202600 Polva,** Estonio/USSR.

Teknikisto, 45 jara, interesiĝas pri bk kaj E-insignoj. L. Bartaševičius, **235030 Kedainiai,** P/K 30, Litovio.

Deziras korespondi laŭ komuna adreso USSR, **280 000 Ĥmelnickij,** str. 25 oktobro nr. 43, Kulturdomo, Esperantoklubo:

Gara Vladmir, laboristo-tornisto, 28 j;
Uŝickaja Sofia, instruistino de angla lingvo, 23 jara;
Bobjor Maria, inĝenierino-geodezistino, 32 jara kun filineto;
Bobjer Nataŝa, 8 jara, lernantino-denaska esperantistino;
Primak Natalja, laboristino-muntistino, 75 jara;
Kovta Oleg, 16 jara, lernanto el urbeto „Černij Ostrov" (Nigra insulo);
Fedĉenko Ljubov, radioteknistino, 20 j.;
Ivan Krutikov, inĝeniero-vojkonstruisto, 75 jara;;
Andreo Rogov, instruisto de Esperanto, prezidanto de E-klubo, 59 jara;
Šarova Anna, ekonomistino, 28 jara, kurs-estrino;
Pajonk Bronislav (polo), laboristo, 28 j.;
Stojanovskaja Tamara, kuracistino, 59 jara, „panjo" de nia E-klubo;
Primak Grigorij, laboristo-instrumentisto, 23 jara;
Kovalĉuk Jurij, laboristo-seruristo, 18 jara;
Kanevski Aleksandr, inĝeniero, 24 jara;
Babiĉuk Vasilij, 17 jara, lernanto-poligloto;
Zakotjanskij Valerij, 17 jara, lernanto:
Fraŭlino, 18 jara, interesiĝas pri bk, fotoj de aktoroj, muziko, gazetoj;
Lubov Kuzmenko, **Doneck-92,** str. Niĝne-Kurganskaja 21, kv. 105.

Lernanto, 17 jara, dez. koresp. kun tuta mondo, interesiĝas pri sporto kaj muziko. Justinas Lukoŝevičius **Vilkaviŝkio,** raj. Alksnines, pšt. Patilćius, kol. Litovio.

Teknikisto, 33 jara, dez. koresp. tutmonde, kol. bk, insignojn. Heino Metsamärt, Kunderi 7, **202 900 Viljandi,** Estonio.

Lernanto pri pm, kb, insignoj, Sigitas Baranauskas, **Klaipeda,** M. Gorkio **L 3—3.** Litovio.

Dez. koresp. tutmonde. pm, diskoj, en Esperanto, angla, rusa, estona, Enno Paulson, **203 040 Harju-Kose,** Estonio.

La klubo de Internacia Amikeco pere de sia Esperanto-rondeto en speciala lernejo por infanoj kun postsekvoj de poliemilito kaj cerebrala paralizo proponas seriozan kaj daŭran interkorespondadon kaj interŝanĝon kun lernejoj el ĉiuj landoj, precipe kun specialaj lernejoj kun postsekvoj de malsanoj. Ankaŭ 10 lernantoj studantaj Esperanton proponas personan interkorespondadon. Esperanto - rondeto, **310082 Ĥarkiv-82,** Ukr. SSR, Mejlauka 8, Škola-internat, KJD.

Knabino 18 jara, interesiĝas pri sporto, turismo. Laima Rudaityte, **233002 Kaunas-2,** Drobes 81-1, Litovio.

Kvindek gekursanoj, lernantoj, studentoj kaj diversfakaj oficistoj en la aĝo de 14—67 jaroj serĉas korespondantojn el la tuta mondo. Esperanto-klubo, **202400 Tartu,** Kalevi tän. 24. Estonio.

Lernanto, 17 jara, kol. insignojn, lit. pri vojaĝoj, Viktor Prohorov, **Ufa-76,** ul. Gornaja 6—1.

Ilse Henrichson, 48 jara, pri ĉ. t., **202900 Viljandi,** Ilmarise 4—5, Estonio.

Pri ĉ. t. sinjorino, 48 jara. Laine Rüütli, **202900 Viljandi,** Kevade 14, Estonio.

Gelernantoj 12—16 jaraj deziras korespondi kun samaĝuloj el tuta mondo. Diversaj interŝanĝoj. Skribu al: KID-Esperanto, Škola N 150, str. Armavirskaja, **340074 Doneck,** USSR.

20 geknaboj 12—16 jaraj komencis lerni Esperanton. Skribu al ni el tuta mondo pri diversay temoj! Adreso: Esperantokurso, Detskij sektor en DK „Jubilejnij", **340074 Doneck,** USSR.

**GRAVE!** Esperantistoj — gastoj de iu ajn urbo en Ukrainio nepre sendu antaŭan sciigon pri via alveno. Adreso: Nikolaj Starodubcev, poŝtrestante, **340047 Doneck,** Sovetunio.

Geknaboj el Klubo de Internacia Amikeco de kemia teknikumo dez. koresp. kun mezteknikaj lernejoj (Libera Germana Junularo). TPK, Komitet VLKCM, KID, E-klubo, **Tula,** ul. Lenina 92.

---

Herausgeber: Kulturbund der DDR
(Zentraler Arbeitskreis Esperanto).
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60.
Fernruf: 22 59 91.
Verantwortl. Redakteur: Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Otto Bäßler, Dr. Hans Eichhorn, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Willi Vildebrand. - Veröffentlicht unter der Lizenznummer 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. - Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Gläuchau